


EL POPOLO ĈINIO

中國新聞

12
1998


ISSN 0032 - 4361



20 jaroj de reformado en
la ĉina kamparo

Batalo kontraŭ inundo

Eufemismo en la ĉina lingvo



Montoj, stepo kaj ĉevaloj

Foto de LIU CHUNCHI

INTER NI

La jaro 1998 preskaŭ pasis. Ni pensas, ke niaj legantoj havas grandan rikolton en la jaro. Redaktinte tiun ĉi numeron, ni finis la laboron de 1998. Ĉu ni bone plenumis la taskon aŭ ne, tion rajtas prijuĝi nur la legantoj.

En 1998 ni akceptis proponojn de la legantoj pri artikoloj kaj bildoj — pliriĉiĝas kultura aspekto kaj enhavo pri la socia vivo, precipe la rubriko “Temo proponita de legantoj”. Pro limigo de paĝoj, nur parto de la proponoj kaj opinioj de la legantoj estas vidata en tiu ĉi rubriko. Tamen la artikoloj montras, ke ni laŭeble aperigas ion ŝatatan de la legantoj, ekz. pri la ĉina lingvo kaj pri elekto de okupo de ĉinoj.

La proponoj kaj konsiloj de la legantoj montras, ke ili sentas “EPC estas NIA revuo”. Pro tio ni tre ĝojas kaj dankas ĉiujn niajn legantojn.

Antaŭ 20 jaroj komenciĝis la reformado en la kamparo de Ĉinio. En tiu ĉi numero ni prezentas raportaĵon por retrorigardi la historion. En la pasintaj jaroj, ni ofte raportis pri la reformado en Ĉinio, ĉar ĝi forte influas la ekonomion kaj socian vivon kaj estas atentata de la legantoj.

Okazis somere inundo en Ĉinio, pri tio eble niaj legantoj iom informiĝis kaj ni raportas en ĉi tiu numero.

La Red.

El Popola Ĉinio

12 [483] 1998



En montvilaĝo de norda Ĉinio

Foto de Liu Qiyun

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P. O. Kesto 77,

Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso:

+86-10-6832 1808

Retpoŝto:


epc@china-report.com

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/elpopolacxinio>>

ENHAVO

- | | | |
|----|-------------------------------------------------------|----------------------------------------------------------------------|
| 2 | INTER NI | ĉina kamparo |
| 4 | Luozhui kaj lia familio | 33 AMUZO |
| 6 | JUNULARO:
Por morgaŭa renkontiĝo | 35 Pejzaĝo de Jinjiang-rivero |
| 8 | Eŭfemismo en la ĉina lingvo | 36 En kuracejo por aidesuloj |
| 10 | Batalo kontraŭ inundo | 38 MULTNACIA ĈINIO:
Trafikreto en Guangxi |
| 12 | Mia travivaĵo pri Esperanto | 40 Utiligo de kalabasoj |
| 13 | ORIGINALE VERKITAĴ:
Vojaĝaj notoj | 42 Nekonataj herooj |
| 14 | POR KOMENCANTOJ:
Vivi honeste | 43 KORESPONDI DEZIRAS |
| 15 | ESP-NOVAĴOJ | 44 EL ĈINAJ GAZETOJ |
| 16 | Ŝanĝiĝo de Dabagou | 46 TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:
Tradiciaj ludoj kaj ludiloj |
| 20 | Serĉi "pekin-homojn" | 48 Infanoj en familio sen patro aŭ patrino |
| 21 | NUNTEMPA BELARTO:
Skulpti lignon kaj ŝtonon | 2 Montoj, stepo kaj ĉevaloj |
| 24 | Klareco de la spirito | SUR LA DORSKOVRILO:
[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ] |
| 25 | HOMARO KAJ NATURO:
Bunta Golfo | Mia najbaro en Alaska; |
| 28 | EKONOMIE:
20 jaroj de reformado en la | Montara izolejo |



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|-----------------------------|-------------------|
| 1. Guangxi (p. 38) | 4. Pekino (p. 20) |
| 2. Anhui (p. 28) | 5. Tibeto (p. 4) |
| 3. Interna Mongolio (p. 16) | |

Luozhui kaj lia familio

LUOZHUI estas indiĝena tibetano sunbruna, malalta kaj maldika. Li ne parolis han-lingvon, tamen liaj nigraj kaj helaj okuloj montris, ke li komprenas nin alilokanojn, kiuj salutis lin kaj volis viziti lian hejmon. Helpate de interpretisto, Luozhui kune kun siaj edzino kaj bofilino akceptis nin en sia hejmo.

La familio de Luozhui estas ordinara en Shannan, unu el la riĉe naturdotitaj regionoj en Tibeto. En la familio estas dek anoj; Luozhui kaj lia edzino, kvar filoj, unu filino, unu bofilino kaj du nepoj. Dum nia vizito en la hejmo restis nur Luozhui, liaj edzino kaj bofilino, la aliaj estis en laborejo aŭ en lernejo. Kaj la granda korto aspektas iel malplena.

Videble, la familio estas riĉa. Flanke de la korto estas tenejo kun sakoj plenaj de objektoj; aliflanke estas stalo, kie bovoj kaj ĉevaloj manĝas furaĝon. Ĉie regas pureco kaj ordo.

La U-forma loĝejo aspektis granda kaj bela kun larĝa verando kaj ĉambroj interkomunikaj. Luozhui diris, ke tibetanoj ŝatas loĝi eĉ kun edzigitaj filoj. En la loĝejo ĉiuj liaj filoj havas sian propran ĉambron sufiĉe grandan. Ni scivolemis pri la purigo de tiel multaj ĉambroj. Luozhui diris: "Tio tute ne estas malfacila. La gefiloj estas laboremaj. Antaŭ ĉiu festo, kunlaborante ni povas pu-



La bofilino de Luozhui prezentas buter-teon al gastoj.

rigi la ĉambrojn en mallonga tempo."

La gastoĉambro estas 3-4-oble pli granda ol aliaj. Sur la vizaĝ-al-vizaĝe metitaj grandaj sofoj estas dikaj tibet-stilaj kusenoj. Antaŭ la sofoj, sur tibet-stilaj tabletoj estas bombonoj kaj kukoj. Qiongji, bofilino de Luozhui, regalis nin per buter-teo, kies odoro rapide plenigis la ĉambron.


Qiongji estas bela tibeta junulino. Ŝi, kun roz-kolora tibeta robo sur sia svelta korpo, aspektas ne kiel patrino de du infanoj. Je la komenco de nia vizito ŝi ne parolis, kun vizaĝo ruĝiĝinta. Kiam ni demandis, ĉu ŝi volas naski pliajn infanojn, ŝi senhezite skuis la kapon kaj respondis kun vizaĝo ankoraŭ ruĝa, ke filo kaj filino jam kontentigis ŝin, kaj ŝi volas sendi ilin eston-

tece en universitaton, por ke ili ricevu pli bonan edukadon.

Je mencio pri universitato Luozhui daŭrigis la paroladon. Li bedaŭris, ke li ne donis al sia plej aĝa filo, nome la edzo de Qiongji, kaj sia dua filo ŝancon daŭrigi la lernadon. Ĉar antaŭe la vivo de la familio estis malfacila. Tiam li per pruntita mono aĉetis traktoron, por ke la du pliaĝaj filoj okupiĝu pri transportado. Dank' al la transportado la familio riĉiĝis kaj la traktoro estis anstataŭigita per kamiono.

"Ĉu la filoj donas al vi la enspezitan monon?" mi demandis.

Luozhui diris: "Mi ne bezonas ilian monon, ĉar mi havas mian propran enspezon. Antaŭ longe mi estis ĉevalbredisto. Post la liberiĝo de Tibeto mi fariĝis terkulturisto. Nun mi havas agrojn de preskaŭ unu hektaro. Ni en-



Luozhui kaj lia edzino preparas manĝon.

spezas per vendo de greno kaj legomoj, kaj krome ankaŭ per bovo- kaj ŝafo-bredado kaj kuse- no-teksado de miaj edzino kaj bofilino. Ĉiujare la familio en- pezas 70 000 juanojn (1 USD = 8.3 juanoj), kio estas la meza nivelo en la vilaĝo. Riĉiĝinte, mi ege deziras, ke la infanoj pli multe lernu. Mi ofte preĝas por bona lernado de la filoj kaj nepoj.”

Ĉe mencio pri preĝo la temo de nia parolado sin turnis al reli- gia kredo. Preskaŭ ĉiuj tibetanoj, inkl. de Luozhui kaj liaj famili-

la portreto estas oferaĵ-tablo, sur ĝi estas ligna ujo kun tibeta bil- do, plena de sekal-faruno kaj fasko da sekalaj spikoj. Luozhui diris al ni, ke tio estas maniero de tibetanoj peti bonaŭguron. Ĉiujare oni okazigas ceremonion por ŝanĝi la se- kalajn spik- ojn.

T i b e t - anoj kredas je sia propra religio kaj konservas sian propran moron, dume ili ne evitas modernan viv- manieron. En la gasto- ĉambro de Luozhui, krom tibet- stilaj mebloj kaj buterteo,

troviĝas ankaŭ televidilo, mag- netofono kaj fridujo. Li diris, ke muzikon ŝatas la tria filo, kiu aĉetis la magnetofonon. Ĉar ili ĉiuj ŝatas televidon, ili aĉetis te- levidilon. Eĉ en la plej varmaj

tagoj en somero tie ne necesas fridujo. Por kio do ĝi utilas? Pri tio Luozhui klarigis: “Aŭtune en rikolta sezono ni bezonas helpan- tojn. Tiam la fridujo estas uzata por konservi pli multe da vian- do.” Videble, lia familio ĉiujare nur en tiu sezono disponas la fridu- jon.

Dum ni parolis kun Luozhui, lia edzino preskaŭ silentis, sidante apud li. Tamen en kuirejo ŝi tre aktivis. Luozhui foje-refoje dek- laris, ke preparado de manĝaĵoj estas lia okupo. Tamen ni rimar- kis, ke lia edzino multe helpas lin. Dume mi trovis, krom la puraj potoj ĉe la forno, ankaŭ okulfra- pan simplan pentraĵon sur la muro pri skorpiego kaj pelvo kun fajro. Luozhui diris al ni, ke ĝi estas uzata por forpeli demonon, kaj la tibetaj vortoj sur ĝi signifas “Bonaŭguron en la Jaro de Ti- gro”.

Ni adiaŭis Luozhui kaj liajn familianojn ĉe la pordo. Kiam nia aŭto veturis malproksimen, mi vidis ilin ankoraŭ starantaj ĉe la pordo. Kia feliĉa familio! Elkore mi deziras, ke Luozhui frue rea- ligu sian deziron viziti Lhasa kaj Pekinon. ■



Utiligo de sunenergio por boligi akvon

anoj, kredas je tibeta budhismo. Kvankam en lia hejmo ne troviĝas speciala preĝejo, tamen sur muro de la gastoĉambro pendas por- treto de Banĉen la Deko, gvidan- to de la tibeta religio. Flanke de

Por morgaŭa renkontiĝo

— Impreso pri la 17-a Komuna Seminario

de XIANG HONG

La 1-a Komuna Seminario (KS) okazis en Koreio en 1982. Kaj ĝis 1994 KS estis renkontiĝo de japanaj kaj koreaj junuloj. De 1995 KS estas trilanda — aliĝis ankaŭ la Ĉina Junulara E-Asocio. Jen raporto pri la 17-a KS, la dua en Ĉinio, verkita de Xiang Hong, unu el ĝiaj organizantoj kaj spertantoj.

Yu Tao

LA 27-a de julio 1998, Pekino.

Finfine tagiĝis. Nevolonteco tamen ne povis reteni la pason de la tempo. Post sendorma babilado, trinkado kaj kantado la partoprenantoj de la 17-a KS alfrontis doloran disiĝon. Je la 8-a matene, pro ekskurso iuj KS-anoj devis forlasi la seminariojn — Hotelo Yunxiang. Je la 9-a la aliaj havis la ferman ceremonion. Memoraĵoj estis interŝanĝitaj, fotoj estis faritaj. Iuj sentimentalaj fraŭlinoj eĉ ploris.

De la 24-a ĝis la 27-a nekonatoj fariĝis intimaj amikoj. Nur tiam, kiam oni deklaris la sukcesan finiĝon de la KS, la organizantoj komplete kaj kontente trankviliĝis post la lacigaj tagoj. Ili kore dankas Esperanton, kiu donis la eblon okazigi la maloftan renkontiĝon en Pekino por 100 esperantistoj el Koreio, Japanio, Aŭstralio, Argentino, Pollando kaj kompreneble ankaŭ el Ĉinio.

FRUKTO DE LA 17-A KS

Krom sukceso de kutimaj programoj, kiaj inaŭguro, diskutoj pri la ĉeftemo kaj aliaj temoj,

vesperoj interkona, amuza kaj internacia, la plej ĝojiga frukto de tiu ĉi KS estas la naskiĝo de la Prepara Komisiono de Junulara Azia Movado (JAM). De 23:00 de la 26-a ĝis 2:00 de la 27-a, dum aliaj KS-anoj kantante kaj babilante ĝuis sian lastan seminariojn vesperon, deko da estraranoj de la Korea, Japanaj kaj Ĉinaj E-junularaj Asocioj varme diskutis pri la junulara movado en Azio. Ili donis frukton — rezolucio de la 17-a KS, kies ĉefa enhavo estas:

1. *Starigi la Preparan Komisionon de Junulara Azia Movado (JAM).*

2. *Celoj de la Prepara Komisiono de JAM estas:*


a. *Plivigli la E-junularon en Azio;*

b. *Fluigi komunikadon inter aziaj junularaj asocioj;*

c. *Antaŭenpuŝi la junularan E-movadon en pli da aziaj landoj;*

ĉ. *Intimigi TEJO-n kaj aziajn junularajn asociojn.*


3. *Bill Mak el Hongkong estis elektita kiel respondeculo de la Prepara Komisiono de JAM.*



La aŭtoro (maldekstre) kaj korea e-isto Ma Young-tae

La rezolucio ricevis aplaŭdon en la fermo de la KS.

Mi rememoris la salutleteron de Joseph Truong, prezidanto de TEJO, kiu diris: "Certe dank' al la renkontiĝoj kiel KS, la junulara movado en Azio povos progresi antaŭen." Mi rememoris ankaŭ la 13-an KS, kiu okazis antaŭ kvar jaroj en Dankook-Universitato en Chonan de Koreio. Tiam Edlyn kaj Danny, vic-



KS-anoj en la kurso pri la ĉina lingvo

prezidantoj de TEJO, akceptis intervjuon de mi kaj aliaj ĉinaj junuloj el EPC kaj E-sekcio de Ĉina Radio Internacia. Pri la junulara movado en Ĉinio, Edlyn proponis: “La unua paŝo por vi certe estas kunlaboro kun la japanaj kaj koreaj junuloj. Tion TEJO ĉiam subtenas.” Ĝuste en tiu ĉi KS, junuloj el la tri landoj unuafoje kunsidis por plani aliĝon de la Ĉina Junulara E-Asocio (ĈJEA) al la organizantaro de KS.

En 1995, en Tianjin de Ĉinio, realiĝis la unua paŝo.

Ĉu la fondiĝo de la Prepara Komisiono de JAM estas nova paŝo?

EDIFO DE LA ĈEFTEMO

En la enkonduka parolo pri la ĉeftemo “Esperanto kaj mi”, Yu Tao, prezidanto de ĈJEA, diris: “Tiu temo donis al ni ŝancon ne nur retrorigardi la historion, sed ankaŭ plani kaj prepari la estontecon.”

Dum la KS, en du 2-horaj diskutoj pri la ĉeftemo, oficialajn prelegojn faris s-anoj Ma Young-tae kaj Shin Dong-hyun el Koreio, Gotou Humihiko el Japanio, Shi Xueqin, Huang Yinbao kaj Ji Dalu el Ĉinio. Veteranaĵ esperantistoj Laŭlum el Ĉinio, Paulo Desailly el Aŭstralio,

Feliks Malinowski el Pollando aldonis edifoplenajn opiniojn pri utilo, lernado kaj propagando de Esperanto. Dank’ al diversaj rakontoj, multaj partoprenantoj kune dividis la ĝojon kunesti en granda familio internacia. La diskutoj montras, ke Esperanto ne nur estas utila internacia helpa lingvo, sed ankaŭ povas ludi gravan rolon por solvi problemojn inkluzive de la lingva en la estonta mondo.

La vortoj de s-ano Ma Young-tae estas elvokivaj: “John F. Kennedy diris: Ne demandu, kion via patrujo povas fari por vi, sed pripensu, kion vi povas fari por via patrujo. Nun mi privokas: Ne demandu, kion Esperantujo povas fari por vi, sed pripensu, kion vi povas fari por nia verda lando Esperantujo!”

Kian efikan laboron fari por E-movado? Laŭ sia sperto li donis serion da konsiloj, ekz., ekipu vin per flua lingvo-kapablo de Esperanto, kuraĝe konigu al neesperantistoj Esperanton, senĉese praktiku Esperanton parole kaj skribe, enlande kaj internacie, kaj instruu Esperanton al niaj ĉirkaŭaj homoj. Tiel praktikis ne nur li, sed ankaŭ aliaj KS-anoj, kiaj Lee Jungkee el Koreio kaj Shi Xueqin el Ĉinio, kiuj rikoltis multe

en praktikado kaj propagando de Esperanto.

Ŝajne la temo “Esperanto kaj mi” estis hazarde elpensita de la organizantoj, tamen ĝi donis al la diskutoj neatenditan seriozecon — junaj esperantistoj dronis en meditado: Ĉu la estonteco de Esperanto dependas de ni? Kion do ni devas fari?

Eble la Prepara Komisiono de JAM donos partan respondon.

POR MORGAŬA RENKONTIĜO

En la internacia vespero, s-ano Lee Jungkee, kiel unu el la iniciatintoj de KS kaj observanto de la azia E-movado, diris sian impreson kaj esperon. Li dankis la ĉinajn organizantojn pro ilia laboro por livero de komforta loĝejo kaj enhavoriĉaj programoj. Tamen li diris, ke la lastaj KS-oj pli kaj pli karakteriziĝis per komencanteco. Kvankam inter junaj esperantistoj estas multaj komencantoj, tamen kiel organizantoj de la KS, la estroj de la landaj junularaj asocioj devas klopodi por profundigi la kuniĝon de junuloj, por ke ĝi ne restu supraĵa.

Dum tiu ĉi KS la estraranoj de la junularoj el la tri landoj diskutis ankaŭ pri la venonta KS en Japanio. Reprezentantoj de la Japana E-Junularo (JEJ) decidis, ke JEJ elektos urbon ĉe la okcidenta marbordo de Japanio kiel gastiganton de la venonta KS. Tio tiris nian penson al la morgaŭo.

La 4-taga kuniĝo estas tre valora, ĉar dum preskaŭ unu jaro la junuloj ne havos pli da ŝanco vidi unu alian. Tial ĉe la adiaŭo multaj partoprenantoj larmis. Shin Dong-hyun el Koreio senĉese konsolis la plorantojn: “Memoru, la nuna disiĝo signifas estontan renkontiĝon.” Por morgaŭo, ni junuloj devas pli diligente lerni la lingvon, pli multe korespondi unu kun alia kaj pli bone nin prepari, ĉu ne? ■

Eŭfemismo en la ĉina lingvo


SAME kiel tabuoj, preskaŭ en ĉiuj lingvoj troviĝas ankaŭ eŭfemismo, ĉar por eviti la tabuajn vortojn, oni ne pre bezonas eŭfemismojn kiel anstataŭon. Fakte, en mia artikolo pri tabuoj en la ĉina lingvo (aperinta en la 9-a n-ro de EPC, 1998), mi jam pli malpli traktis la temon pri eŭfemismo. Tamen eŭfemismoj estas uzataj ne nur por anstataŭigi la evitindajn esprimojn, sed ankaŭ por aliaj celoj.

Por eviti la malfavorajn esprimojn, oni anstataŭigas ilin per la favoraj. Ekz., por eviti la vorton “morto”, oni aplikas ĝian antonimon “longviveco”. En pasinta tempo ĉinoj kredis, ke la homa spirito ankoraŭ vivas post la morto de la korpo, ili do tre atente zorgis pri sia postmorta vivo. Jam dum sia mezaĝo la riĉuloj kutime preparis por si mem mortovestaĵojn, ĉerkon kaj tombon, kaj oni nomis ilin “porlongvivaj” vestaĵoj, lignaĵo kaj kavo respektive.

Antikva Ĉinio estis agrikultura lando, tial oni opiniis agrikulturon pli grava ol komerco, kaj la komercistoj estis rigardataj kiel profitavidaj homoj, kaj oni ne ŝatis rekte paroli aŭ skribi pri mono kaj kreis eŭfemismon por ĝi. Antikve, ĉina monero estis farita el kupro en ronda formo kun kvadrata truon en la mezo por faciligi la kunligadon per ŝnuro, oni humure donis al ĝi la titolon “sinjoro de kvadrata truon”. Alia tiu-

speca sinonimo estas “run-bi” (jun-bi) signifanta “humidigi la plumon”, same kiel la Esperanta vorto “honorario” por verkisto, pentristo aŭ kalfografo. Nun anstataŭ tiuj du eŭfemismoj oni simple uzas la vortojn “salajro” kaj “pago”.

Interese estas, ke ĉinoj ofte uzas la vorton “floro” aŭ “floro kaj saliko” por esprimi erotikajn aferojn. Ekz., se oni dirus, ke s-ro Ikso ŝatas “serĉi floron kaj salikon”, tio signifas, ke tiu s-ro frekventas bordelojn. Kaj la venerea malsano estis nomata “flor-salika malsano”. Oni nomas diboĉeman junulon “flora fraŭlo”. Mirinde estas, ke la vorto “flora” estas iaokaze kunligita kun bonzo, por kiu diboĉado ja estas absolute malpermesata laŭ la budhisma disciplino. Iu eminenta bonzo, kiu ofte faris budhismajn prelegojn, fakte estas di-



La aŭtoro

boĉemulo. Li do estas titolita “flora bonzo”.

En la ĉina lingvo multaj eŭfemismoj estas esprimataj per koloroj. En antikva ĉina poeziaĵo aŭ rakonto oni ĉiam figuris, ke junulinoj estas tiel ĉarmaj kiel freŝaj persikfloroj. Sekve, oni kreis la esprimon “persikflora” kiel pornografian eŭfemismon.

Ekz. la agado pri la “flora” bonzo estas nomata “persikflora okazaĵo” kaj la rilata raportaĵo — “persikflora novaĵo”.

La nigra koloro estas uzata por kontraŭleĝa afero. Ekz., “nigra parolo” estas ĵargono de friponoj aŭ alispecaj fiuloj; “nigra varo” estas kontraŭleĝa varo; “nigra socio” estas bando de kontrabandistoj, disvendistoj de narkotaĵoj k.s.

En antikva Ĉinio la flava koloro estis rigardata kiel la plej solena koloro kaj ĝi taŭgas por la plej majesta persono, nome, imperiestro. Nur li havis la rajton vesti sin per flava robo kaj lia dekreto skribita sur flava papero estis nomata “flava anonco”. Sed nun tiu koloro perdis sian majestecon kaj fariĝis simbolo de pornografiaĵo. Tiu esprimo estis enkondukita el la angla lingvo, kiu nomas la ĵurnalon kun pornografia enhavo “flava ĵurnalo”. En nia lando oni nomas la batalon kontraŭ pornografiaj eldonaĵoj “kampanjo por forbalai la flavan koloron”.

La verda koloro estas tre ŝatata de la ĉinoj, ĉar ĝi simbolas vivon kaj estas signo de medi-protektado. Sed antikve la popolanoj el la plej malalta socitavolo, precipe la krimuloj, estis devigitaj porti kaptukon el verda ŝtofo. Poste, leĝo difinis, ke la viroj, kiuj okupiĝas en bordeloj, devas porti verdan kaptukon aŭ ĉapon. Rezulte, se iu viro, kies edzino havus alian amaton, kutime estis mokita kiel “ulo kun verda kaptuko” aŭ “verd-ĉapulo”. Sed nuntempe oni ne plu mokas tian edzon, kaj nomas la eksteredzegan amaton de la edzino “enmiksiĝinto”. Estas raportite, ke la procento de eksgeedziĝo kreskis ĉiujare en Ĉinio dum la lastaj jaroj. La apero de la “enmiksiĝinto” ne povas ne esti unu el ĝiaj kaŭzoj.

En la ĉina lingvo eŭfemismo estas kreita ankaŭ pro psikologia motivo por mildigi la vortojn, kiuj ŝajnas esti malagrablaj

al la aŭskultantoj. Ekz., por eviti la vorton “blinda”, oni kreis la eŭfemismon “lumomanka”; “surda” estas aludo de la esprimo “orelo nekonvena”; kaj idio-taj infanoj estas nomataj “infanoj kun malforta inteligenteco”. Tiuj eŭfemismoj povas mildigi la malagrablajn sentojn de la handikapuloj kaj utili al ilia psikologia ekvilibro.

De longe Ĉinio alte taksas etiketon, kaj multaj eŭfemismoj en la ĉina lingvo estas aplikataj por etiketa celo aŭ por esprimi ĝentilecon aŭ modestecon. Ekzemple, anstataŭ “via opinio” oni diras “via altvalora opinio”, kaj anstataŭ “mia opinio” oni diras “mia humila opinio” aŭ “neperfekta ideo”. Pri ies verko oni ofte diras “lia granda verko”, eĉ fakte la menciita verko estas nur mallonga kaj ordinara skribaĵo, dume pri sia propra verko oni kutime diras, ke lia verko estas “fuŝa skribaĵo”, malgraŭ ke la verko estas altnivela.

Tia sinhumiliga modesteco ofte kaŭzas miskomprenon de fremdlandanoj, kiuj ne kutimiĝas al tia esprimo pri modesteco kaj rigardas ĝin kiel hipokritecon. Estis iu ĉina studento, kiu deziris studi en brita universitato. Kiam li unuafoje vizitis la stud-gvidanton, li diris, ke liaj fakaj scioj ne

estas profundaj kaj liaj atingoj ne kontentigaj, kaj petis la profesoron multe lin instrui kaj helpi. Sed tiuj modestaj vortoj ne plaĉis al la profesoro, ĉar li opiniis ke tiu studento ne estas taŭga. Poste li trovis, ke la studento estas talenta, kaj riproĉis lin, kial li ne diris la veron.

Ankaŭ mia artikolo “Aludoj en la ĉina lingvo” (vd. la 5-an nron de EPĈ, 1998) kaŭzis miskomprenon de s-ro Hans Fehler el Germanio. Li skribis al la redakcio de EPĈ, ke tiun artikolon li tre ŝatas, sed mirinde estas por li, ke mi skribis ĉe la fino, ke “tiu ĉi artikolo el mia plumo estas nur fuŝa skribaĵo.” Li skribis, ke se la aŭtoro estus skribinta tiujn vortojn ĉe la komenco, li ne estus leganta ĝin. Kial li legu ion, kion eĉ la aŭtoro opinias “fuŝaĵo”?

Tiuj faktoj montras, ke la diferenco inter la ĉina kaj okcidenta kulturoj kaj tradicioj estas tre granda, kaj la interkompreniĝo inter ambaŭ flankoj ege ne sufiĉas. Ni esperantistoj devas pli energie labori por pli intensigi la interkompreniĝon per nia lingvo Esperanto. Mi kore dankas s-ron Fehler pro lia varma letero kaj kredas, ke ĉi-foje li ne plu miskomprenos mian tute honestan ideon. ■

Kunlaboro petata

La Hangzhou-a Komerca Kompanio “Esperanto-Maró” volas kunlabori kun ĉiuj E-organizoj kaj esperantistoj pri komerca traktado, varo-perado, poŝta aĉetado kaj interŝanĝo de varoj.

Adreso: Direktoro Qiu Xirong, Jiefang Lu 24, CN-310009 Hangzhou, Zhejiang, Ĉinio

Telefono: +86-571-7071705

Telefakso: +86-571-7035995

Batalo kontraŭ inundo

ĈI-SOMERE la basenoj de Yangzi-rivero kaj Songhua-rivero sinsekve suferis de malofta inundo. Dum tiuj tagoj, en Ĉinio oni foje-refoje maltrankviliĝis pro alveno de superakvego kaj foje-refoje ĝojigis pro ĝia forfluo. Nun, la katastrofo jam foriĝis, tamen la animskuaj kontraŭinundaj scenoj estas neforgeseblaj por la ĉina popolo.

MALOFTA KATASTROFO

Inter junio kaj aŭgusto en la baseno de Yangzi-rivero 3-foje pluvegis longdaŭre kaj grandaree. En iuj lokoj la pluvokvanto estis duoble pli granda ol tiu en la sama periodo de la pasintaj jaroj kaj en norda Jiangxi en la malsupra baseno de Yangzi-rivero ĝi tri-

obliĝis kaj pli kaj pli multiĝis, finfine okazis en la tuta baseno inundo multe pli serioza ol tiu, kiu okazis en 1954. Estis sinsekvaj 8 diluvaj pintoj, la unuaj 6 furiozis unu pli ol alia kaj la akvonivelo en la meza kaj malsupra partoj de la rivero superis la avertan akvonivelon dum pli ol 60 tagoj.

Dum inundo furiozis en suda Ĉinio, pluvegis en nordorienta Ĉinio, kio 3-foje endanĝerigis la riverojn Songhua kaj Nenjiang. La daŭro, alteco kaj flukvanto de la diluvaj pintoj estis senprecedencaj.

En la lastaj 10 tagoj de aŭgusto, 29 el la 32 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj de Ĉinio malsamgrade suferis de inundo, kiu ruinigis 25.78 milionojn da hektaroj da kampoj,

plagis 230 milionojn da loĝantoj, mortigis 3 004 homojn (1 320 en la baseno de Yangzi-rivero) kaj detruis 4 970 000 domojn. La rekta ekonomia perdo estas 30 miliardoj da usonaj dolaroj.

BATALO INTER VIVO KAJ MORTO

Alarmis Yangzi-rivero! Alarmis Songhua-rivero! La 1-an de aŭgusto inundo breĉis la digon de Yangzi-rivero ĉe Paizhouwan en Hubei-provinco kaj la 7-an sammonate breĉiĝis la digo de Jiujiang en Jiangxi-provinco. En tiu kriza situacio ĉina prezidanto Jiang Zemin prokrastis sian viziton al alia lando, venis al la digo de Yangzi-rivero kaj mobilizis la tutan popolon por batali kontraŭ la inundo.

Laŭ la ĉina kontraŭinunda leĝo, kiam oni alarmas la popolon kontraŭ minacanta inundo, ĉiuj laboroj devas cedi al la batalo kontraŭ la inundo.

Al tiu batalo Ĉinio sendis pli ol 300 000 policanojn, oficirojn kaj soldatojn de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Ili rapidis al la plej danĝeraj lokoj kaj kune kun la loĝantoj obstine batalis kontraŭ la inundo. Ili transportis ŝultreteron kaj ŝtonojn por konstrui provizorajn digojn. Kiam okazis danĝeroj, ili foje-refoje subakviĝis por ŝtopi breĉojn. Superakvego englutis iujn vilaĝojn kaj minacis ties loĝantojn, kaj la armeanoj kaj policanoj serĉis ilin

Suferantoj de inundo savitaj de armeanoj



sur akvo. Por savi dronantojn iuj el ili oferis sian vivon. Kiam la armeanoj kaj policianoj forlasis la lokojn post foriro de superakvego, la loĝantoj adiaŭis ilin kun larmoj kaj nomis ilin homoj plej amindaj en la nuntempo.

UNU SUFERAS, ALIAJ HELPAS

Kiam intensis la batalo kontraŭ la inundo, ekis diversaj helpoj en aliaj lokoj: kolekti monon, transporti grandan kvanton da varoj kaj sendi kuracajn taĉmentojn al plagitaj regionoj.

La 11-an de aŭgusto, Zheng Wenjiang venis en la Buroon de Civilaj Aferoj por donaci monon al suferantoj de la inundo. Li estis la unua mondonacinto. Li diris, ke li estas postvivanto de la kruela tertremo okazinta en 1976 en Tangshan. Tiam la tuta lando helpis Tangshan, ĉi-foje li rekompencis la popolon per mondonaco. Ankaŭ maljunuloj kaj infanoj faris mondonacon. Iu knabino donacis 3.21 juanojn. Kvankam la sumo estis malgranda, tamen ĝi montris ŝian amon al la suferantoj de la katastrofo. Kunportante 200 mil juanojn donacitajn de laborantoj de la Fabriko de Tibetaj Medikamentoj kaj medikamentojn valorantajn je 800 mil juanoj, respondeculoj de la fabriko vojaĝis de la provinco Qinghai al Pekino. Ili diris, ke antaŭe la popolanoj el diversaj lokoj de la lando helpis ilin en konstruado, nun ili donas amon de la tibet-nacianoj al la suferantoj de la inundo.



Popolanoj kaj armeanoj firmigas la digon de Yangzi-rivero.

En malpli ol unu monato la popolanoj en la ĉina kontinento donacis 2 878 milionojn da juanoj (inkl. tiujn, kiujn valoras donacitaj varoj). Aliaj ĉinoj vivantaj en Hongkong, Aomen (Makao), Taiwan kaj eksterlando esprimis sian amon per mon- kaj vardonacado. Krome, monhelpis ankaŭ la registaroj de Singapuro, Kubo, Koreio, Izraelio, Usono, Japanio k.a.

Menciindas, ke EPC^ĉ-legantoj skribis al ni por esprimi simpatian. Ankaŭ nia finlanda leganto Pentti Tormala donacis monon. Ĉi tie ni kore dankas tiujn legantojn.


BRIDI AKVON — TASKO PEZA

La superakvego forfluis kaj la popolanoj sin turnis al rekonstruado de sia hejmloko. Post la katastrofo oni pensas, kial okazis la inundo kaj kion oni faru kontraŭ eventuala katastrofo.

Post analizado pri la kialoj de la inundo okazinta en la meza

kaj malsupra basenoj de Yangzi-rivero, fakuloj de akvoutiligo kaj meteorologio diris, ke la rivero inundis ĉefe pro vetero eksterordinara, pluvego forta kaj longdaŭra; la inundon intensigis la serioza detruo de la ekologia medio, la serioza perdo de grundo en la supra baseno de la rivero, la sedimentado de la rivervojo, la neefika ellaso de akvo, la malfortikeco de la digo en multaj partoj de la rivero kaj la malaltiĝo de kontraŭinundaj normoj.

Post tio oni ekkonis, ke por altigi la kontraŭinundan kapablon oni devas unue fortigi akvoutiligan konstruon. Por tio, la ĉina registaro decidis grandigi la investon por akvoutiliga konstruado, akceli reordigon de Yangzi-rivero, la Flava Rivero kaj aliaj grandaj riveroj, altigi la kontraŭinundajn normojn kaj samtempe malpermesi arbohakadon kaj arbarizi la montojn. Kompreneble, tio estas peza tasko, tamen la kontraŭinunda kapablo certe altiĝos post penado de pluraj generacioj. ■



KARL MAIER (Germanio):

Mia travivaĵo pri Esperanto

KIAM mia edzino kaj mi alvenis en septembro 1955 orientan Berlinon, GDR, post 22-jara restado en Ĉinio, kie mi de la komenco kunlaboris kun ĉinaj esperantistoj, mia malnova amiko, kun kiu mi en 1924 lernis Esperanton, bonvenigante min diris al mi, vidante mian verdan stelon: "Formetu vian insignon, oni ne ŝatas Esperanton ĉi tie." Poste mi sciigis, ke en GDR ĉiu agado por Esperanto estas malpermesata. Iom post iom mi havis kontaktojn kun esperantistoj precipe en Berlino. Tie mi trovis, ke esperantistoj en la orienta GDR-parto de la urbo veturis en la okcidentan parton por tie partopreni kunvenojn de la tieaj esperantistoj. Inter la unuaj kontaktoj kun esperantistoj estis tiu kun s-ano Schödl, lernejestro en Neuruppin, kiu instruis Esperanton al lernejoj kaj havis bo-

nan kontakton kun registaraj instancoj. Kune kun li ni skribis peticiojn al tiuj instancoj, menciante la strangan situacion en Berlino, kie GDR-anoj devas iri al malamika okcidento por sin ekzerci en Esperanto, ĉar tio estas neebla en nia parto. Ni ankaŭ kontaktis la packonsilantaron kaj povis interesigi ĝin por nia afero. Baldaŭ ĝi informis al mi, ke mi devas iri al la ĉefpolicejo por tie ricevi la permeson por kunveni. Tion mi faris nun ĉiumonate. Pere de la packonsilantaro mi povis ankaŭ helpi al la Leipziger esperantistoj. Sekve de la aktiveco de la esperantistoj la registaro sendis delegacion de 10 esperantistoj al la Internacia Esperanto-Kongreso en 1959 en Varsovio.

Dum niaj klopodoj por la reestablo de Esperanto-organizaĵo en GDR s-ano Schödl petis min transpreni la peradon de la bona

kaj bela ĉina Esperanto-revuo "El Popola Ĉinio", kion mi senhezite konsentis. Mi komencis la peradon por 1958 kaj samtempe mi komencis mian kolektadon de la revuo. La respondo al la varbado estis sukcesplena. La nombro de abonantoj konstante kreskis, tiel ke mi fine de 1961 jam havis pli ol 300 abonantojn. La apero de la ĉina Esperanto-revuo donis al la esperantistoj de GDR novan esperon kaj revivigis la intereson por Esperanto. Sed ĉi tiu favora situacio abrupte ŝanĝiĝis, kiam la konflikto inter Sovetunio kaj Ĉinio akriĝis kaj GDR sian subtenon al Sovetunio intensigis. Nun ĉio el Ĉinio estis malbona. Akupunkturo estis blago kaj medicinisto ne ricevis permeson raporti pri ĝi. 50 Esperantaj ka-

alendaroj estis detruitaj. Mi protestis al la poŝtoŝefo, la poŝtoŝefo senkulpegis sin, sed la kalendaroj estis for. "El Popola Ĉinio" estis ne plu liverata al la abonantoj. Ĝuste dum ĉi tiu tempo la esperantistoj estis informitaj, ke la registaro nun traktas la problemon de Esperanto, sed ni devis atendi ĝis 1965 por la decido. La esperantistoj nun povis starigi novan organizaĵon en la kadro de la kulturligo.

Dum la sekvantaj jaroj la konflikto perdis sian akrecon kaj ni povis aboni la revuon "El Popola Ĉinio" rekte en la poŝtoŝefo, kio ĉesis post la eventoj de 1989. Nun ni bezonas denove perantojn. Feliĉe mi povis dum la malkvieta tempo spite al la multaj malfacilaĵoj daŭrigi mian kolektadon de EPĈ, tiel ke mi nun posedas 67 bnditajn volumojn de la pli kaj pli bela revuo "El Popola Ĉinio". ■

Vojaĝaj notoj

de DAO ANH KHA (Vjetnamio)

Dediĉe al sovaĝa floro

Tra l' kampoj kaj arbaroj mi kunportas
Vian
Parfumon, trans vulkanon trans monton
glacian
Neniel invadas min ajna hom-fetoro
Ĉar plensorbis parfumon Vian miaj
sango, koro!

En aerodromo Nôi Bãi
29-7-98

Al stevardino de Air France

En flugado, malkovru por mi vojojn mil
Ho bunta flor'
Kunvolvante nubegojn plenas via flugil'
De dia sentor'
Benata estu nia apud', tra l' maroj montoj
Gaj-momente
Vin morgaŭ mi sopiros en krud', el
horizontoj
Pluve vente

En aerodromo Charles de Gaulle
30-7-98

Glorkante al la kongres-urbo

Saluton, Montpeliero
La urbo inda je fiero



La aŭtoro

Knabin' la Suda, nimfe bronza
Pro l' Mediteranea vent'
Lulil' la verda, kvazaŭ-sonĝa
En samideaneca sent'
Saluton, Fregorĵo kaj Korumo —
Ejoj de am-fajro, de pens-lumo
Plengloron, Ĵako Koro, Ludoviko —
Prapatroj de la nuna dinamiko
Bonvenon, Antigono, Pierero
Kaj Sanon, Valentina kaj Piero!
Surprizas viaj tagoj plenaj de fabela
ĉarmo
Vi belas en la rido en grimaco kaj en
larmo
Plej verdas viaj nunaj arboj, parkoj kaj
bulvardoj
Ĉi-tie plej promesas aventuroj kaj hazardoj
Tra Langvedoko Rusiljono sonas nun La
Esper'
El ĉi loko — Urbego de la amo kaj
konkordo, Montpelier'!

En kunvenejo Fregorĵo
30-7-98

Vivi honeste

ESTAS fabelo pri leporo kaj lupo. La leporo diligente dissemis, plugis, sarkis, rikoltis kaj konservis la fruktojn de sia laboro. Ŝi havis simplan penson — havi karotojn ĉiam. La lupo estis mallaborema kaj ĝuema. Iutage la lupo vizitis la leporon kaj konigis al ŝi, kiujn bongustaĵojn li iam ĝuis. Aŭskultante, la leporo salivumis kaj ekkonsciis, ke ŝia vivo estis mizera.

Ho ve. Vintro venis. Manĝaĵoj


ekmankis al la lupo. Tiam li tre bedaŭris, dezirante havigi al si eĉ karoton.

Efektive, la homa vivo estas aŭ simpla aŭ arda. La simplaj homoj estas facile kontentaj kiel limako kun dika ŝelo ĉiam grimpana surtere, dum la ardaĵoj estas malfacile kontentigeblaj, kiel rano ĉiam saltanta, kaj aspiras novajn, ekscitajn kaj interesajn aferojn dum la tuta vivo.

La ardaĵoj plejparte es-

tas saĝaj kaj kapablaj en plenumo de sia tasko. Sed la resimpligitaj homoj estas pli saĝaj kaj kapablaj en paŝo-post-paŝa akumulado de spertoj el la ĉiutaga vivo.

Ni devas serioze aranĝi nian vivon kiel la leporo prizorganta siajn karotojn, ĉar neniu alia povas aranĝi nian sorton. Kiam ni renkontas bonŝancon, ni devas tuj kapti ĝin. Kiam ni fariĝas resimpligitaj, ni ankaŭ devas honeste pasigi la vivon. ■



ĈINIO

● Je la 27-a de julio, helpe de la junulara sekcio de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, iu elementa lernejo de la nova distrikto Pudong en Ŝanhajo celebris la 111-an datrevenon de la naskiĝo de Esperanto. Dum la kunveno membroj de la asocio konigis al la lernantoj la historion kaj rolon de Esperanto kaj okazigis konkurson pri E-sci-oj. La lernantoj konkure respondis en la konkurso. Dank' al la kunveno, multaj lernantoj interesiĝis pri Esperanto.

(Shen Xiaoxi)

JUGOSLAVIO

● La tradicia Esperantorenkontiĝo "Verdaj amikaj tagoj", kiu okazis de la 12-a ĝis la 14-a de junio en Senta, tre sukcesis. Pli ol 50 partoprenantoj el la tuta Jugoslavio kaj Hungario ĝuis gastamecon de la dommastroj. La riĉa kultura programo inkluzivis la ekspozicion kaj la prelegon pri Tibor Sekelj. Ne mankis prezentado de ĵus aperintaj libroj: "Antologio de serba poezio", tre valora kaj impona, du libretoj pri E-movado skribitaj nacilingve kaj du vortaroj. En loka poŝto estis la poŝtstampilo "Verdaj amikaj tagoj" 13.06.1998, 24400 Senta. Sukcese faris "A" ekzamenon tri lernantinoj el Senta kaj unu plenkreskulo el Hungario, kaj "B" du el Senta kaj unu el Hungario.

(Sinia Veliĉkovic)

KOREIO

● Prof. Lee Chong-Yeong, eksprezidanto de Universala Esperanto-Asocio, estas elektita kiel prezidanto de Korea Esperanto-Asocio dum la 30-a Korea Kongreso de Esperanto,

kun 3-jara mandato. Prof. Lee kaj lia teamo de la nova estraro de KEA nun planas laborprogramon de koreaj esperantistoj. La baza ideo estas lanĉi "Kampanjon U.E.A.", kadre de la Kampanjo 2000. La Kampanjo U.E.A. celas plivigli la laborojn pri 1) utiligo de Esperanto, 2) edukado de Esperanto, kaj 3) agado por Esperanto.

POLLANDO

● Neforgesebla aranĝo "Freŝo" okazis en la pola urbo Olsztyn (Olŝtin) de la 1-a ĝis 5-a de julio 1998. La aranĝon partoprenis ĉ. 60 personoj kun kelkaj gastoj eksterlandaj. Unua premio valoris 1 000 usonajn dolarojn kun interesaj varoj. Premiojn kaj donacojn ricevis ankaŭ gajnintoj en kvar kategorioj: 1. Ĉiuj partoprenantoj; 2. Eksterlandanoj; 3. Gejunuloj; 4. Infanoj. Gajnintoj de unuaj lokoj ricevis ankaŭ

"Ruslanda Esperantisto". Dum la aranĝo oni havis okazon viziti malnovan urbon kaj antikvaĵojn. (Andrzej Sochacki)

VJETNAMIO

● Je la 20-a de junio 1998, en la templo de literaturo, la Hanoja Esperanto Asocio (HANEA) solene celebris la unujariĝon. Partoprenis la kunsidon pli ol cent personoj. De post sia fondiĝo la HANEA prizorgas kaj la unuiĝon de la movado de la urbo kaj la preparon de la 2-a Azia Kongreso de Esperanto okazonta en Hanojo en 1999. Diversaj kursoj jam malfermiĝis en pluraj lokoj de la urbo. Multaj obstakloj ilin baras (financo, materialoj, nivelo de esperantistoj ...), tamen, la hanoja esperantujo fervore laboras por ke la dato jam fiksitaj fariĝu vera festo de aziaj esperantistoj. Ĉiuj samideanoj de nia kontinento havu okazon



Partoprenantoj de "Freŝo"

jarabonojn de Esperantaj revuoj, i.a., "Esperanto", "Heroldo de Esperanto", "El Popola Ĉinio", "Litova Stelo",

konatiĝi kun ĝentilaj homoj, belaj vidindaĵoj, bongustaj kaj bone preparitaj manĝaĵoj de Vjetnamio. (Nguyen Van Dien)



Ŝanĝigo de Dabagou

Teksto de SHU MEI
Fotoj de LIU SIGONG


TIE estis bela loko, kiu antaŭe nomiĝis Liu-shuchuan (ebenaĵo de salikoj). Sed, post kiam ĝiaj aromaj floroj kaj prosperaj salikoj malaperis el la vido, la antaŭa nomo estis anstataŭita de la nuna — Dabagou (valo de granda digo).

20 jarojn antaŭe, s-ro Wei Shouli ekfunkciis kiel nova estro de Dabagou, distrikto de Ulanhot, Interna Mongolio. En la unua tago, kiam li eklaboris kiel la tiea estro, sablovento furiozis tiel, ke li ne povis malfermi siajn okulojn. Li povis nur piediri, puŝante sian biciklon. Li vidis, ke ĉe la vojo iuj vilaĝoj jam dezertiĝis. Pro arbitra arbohakado serioziĝis erozio, sablovento kaj inundo, kiuj forpelis multajn loĝantojn de ilia hejmloko. Tiuj, kiuj ne volis forlasi siajn mizeran teron kaj difektitan domon, vivis povran vivon.

Post enketo s-ro Wei decidis fari forstokulturon por ŝirmi la lokon kontraŭ sablovento. “Ĉu

tio povos solvi la problemon?” iuj dubis. “Kiam oni povos verdigi tiujn 800 montetojn?” aliaj demandis kun zorgo. La vilaĝanoj tamen suriris montojn, portante ŝovelilon kaj fosilon, por planti arbojn. Pasis unu jaro, du jaroj... Iom post iom, oni trovis, ke la ĉielo bluiĝis, la aero freŝiĝis. De tio la forstumado fariĝis memkonscia aktivado de la loĝantoj.

Vilaĝano Li estas 70-jara. Konsiderante lian grandan aĝon, liaj gefiloj ne lasas lin plu labori surkampe. Sed li ne ŝatas resti hejme sen fari. Li partoprenis en la taĉmento de la vilaĝo por gardi la arbaron. Ĉiutage li promenas sur montoj. Dank’ al lia klopodo, neniu el la plantitaj arbidoj estis mordita de brutoj. Iutage, li postulis, ke la filo kaj bofilino plantu arbojn sur monto, malgraŭ, ke ili estis lacaj post laboro. La filo diris: “Vi jam plantis arbojn kelkoble pli ol kiom vi devis. Do, lasu



malmulte da herboj. Subite, ili rimarkis ŝtipon flosantan sur la rivero. Por ĝin elpreni ili sinsekve sin ĵetis en la akvon, sed ekster ilia atendo, la fluo estis tiel rapida, ke ili surbordiĝis nur post longatempa flosado. “Ni mortus, se ni ne firme kaptus la ŝtipon.” Menciinte tion, ili ankoraŭ sentas timon. “Pro arbaro,” ili diris, “inundo fuĝis, sen arbaro ĝi ruinigis la vilaĝojn.” Nuntempe, la loĝantoj rifuĝintaj pro inundo revenis sian hejmlokon kaj vivas trankvilan vivon.

Zhong Baoguo renomiĝis pro sia kontribuo al forstumo en Dabagou. Antaŭ dekelkaj jaroj, tieaj loĝantoj laŭkontrakte prenis sur sin respondecon por kulturi kampojn, sed li — 37.33 hektarojn da dezerta monto. Lia tuta familio energie laboris sur monto tage kaj nokte. Foje, lia edzino, tro laca kaj dormema, falis de la monto. Hodiaŭ densa arbaro plene kovris la monton kaj ankaŭ la familianoj Zhong multe riĉigis sin. En ilia korto estas kamiono kaj traktoro, en iliaj ĉambroj — granda kolora televidilo kaj ledaj sofoj. Ĉiumatene Zhong promenas en sia arbaro. Li diris, ke la arbaro kiel verda banko, portas al li feliĉan estontecon. Vidinte la profiton de lia verda banko, multaj sekvis lian ekzemplon.

Pasis 20 jaroj. Dabagou denove iĝis arba maro. De s-ro Wei mi informiĝis, ke la verdigita areo de

lama dezerta monto verdigita



vian superfluan kvanton de plantitaj arboj kovri nian taskon.” Sed la maljunulo ne konsentis. Tiam lia nepo hejmen revenis de la lernejo. Li firme staris ĉe sia avo kaj kantis por la gepatroj kanton pri arboplantado, kiun li lernis en la lernejo. Liaj vortoj emociis la avon: “Antaŭe, kiam pluis, nia tuta familio maltrankvile sidis ĉirkaŭ olelampo kaj ne povis dormi tutnokte, timante, ke eventuala superakvo forportos nin. Nun la vivo pliboniĝis kaj ni devas atribui la feliĉon al arboplantado. Oni ne devas zorgi nur pri si mem kaj lasi al posteuloj abomenindan medion!” Post la vespermanĝo li, liaj gefiloj kaj nepo gaje iris al monto por planti arbojn.

Kvankam tre okupitaj de komercado en Ulanhot, la fratoj Xu ĉiam persiste faris arboplantadon en la hejmloko. Foje antaŭ 20 jaroj, kiam ili kolektis hejtaĵojn sur monto, kie troviĝis nenio alia ol



Verda Dabagou

Dabagou kreskis de 2.1% en 1975 al 32% nuntempe. La arboj estas densaj sur montoj. Vilaĝanoj klarigis, ke la altaj estas poploj kaj la malaltaj — pinoj. Ili distancas unu de aliaj je 6 m kaj inter ili estas fosetoj por konservi akvon. Dum tiuj 20 jaroj inundo, sablovento, plantmalsanoj kaj fiinsektoj atakis la arbaron unu post alia, el tio oni konis la gravecon de scienco. En Dabagou establiĝis forstokultura stacio, kie vilaĝanoj lernas sciojn pri arbarokulturo.

Wei havas tri filojn. Du el ili lernis forstokulturon en urbo. Post ilia diplomitiĝo li venigis ilin en la forstokulturan stacion de Dabagou. La peniga vivo en Dabagou ŝanĝis Wei el ĝentila klerulo en kamparanon cent-po-centan kun bruna vizaĝo kaj manoj kaloplenaj. Antaŭ pli ol 20 jaroj li adiaŭis siajn familianojn kaj sola venis en Dabagou por ŝanĝi ĝian aspekton. Dum la unuaj tri jaroj li neniam hejmen revenis, nur en profunda nokto li sopiris al siaj familianoj, rigardante luman urbon trans la rivero. Sed ekde la tagiĝo, li tutkore kaj tutanime sin oferis al Dabagou. “Tio necesis,”



En arbidejo

diris Maljuna Wei. “En tiuj jaroj, kiam venis pluva sezono, okazis inundo. Nur en la oka jaro post la forstumado, ekefikis nia penado. Dank’ al la verdaj ŝirmiloj inundo kaj sablovento mildiĝis iom post iom.”

Antaŭ nelonge Wei ekŝiĝis de la estreco kaj metis sur junulojn sian esperon — daŭre verdigi Dabagou. Kaj la tieaj gejunuloj ne estas malkapablaj ol Wei kaj liaj samtempuloj. Dank’ al ili en Dabagou okazis granda ŝanĝiĝo nur post kelkaj jaroj. Ili plantis arbojn ne nur ekologiajn, sed ankaŭ



Ĉieloskrapaj arboj



Ĉe la forstoj

ekonomiajn. La kampoj estas borderitaj de diversaj fruktarboj. Iu maljuna kamparano promenis inter ili. De tempo al tempo li haltis kaj ilin pririgardis. Sur lia vizaĝo legiĝis ĝojo kaj feliĉo. Li diris, ke la prunarboj plantitaj antaŭ tri jaroj komencis doni fruktojn. Laŭ antaŭkalkulo ĉiu el ili donos almenaŭ dekelkajn kilogramojn da fruktoj. Li esperis, ke ili vendiĝos je la dezirata prezo.

Ĉe vilaĝa enirejo infanoj ludis, kantante arboplantan kanton. Dabagou finfine retrovis la aspekton de la antaŭa Liushuchuan. ■



Vojo al alia loko

Serĉi “pekin-homojn”

NUNTEMPE pekinanoj fervore serĉas fosiliojn de “pekin-homoj”. Antaŭ duonjarcento en kaverno sur Longgu-monto en Zhoukoudian, Pekino, ĉinaj arkeologoj trovis fosiliojn de primitivaj homoj, kiuj vivis antaŭ 500 000 jaroj, iliajn laborilojn, signon de ilia fajro-uzo kaj grandan kvanton da fosilioj de mamuloj. Tie estas la loko kun plej riĉaj historiaj materialoj el la samtempaj ruinoj en la tuta mondo. La ĉinaj arkeologoj nomas tiujn primitivajn homojn “pekin-homoj”. La eltrovo faris sensation siatempe, ĉar ĝi liveris abundon da sciencaj materialoj pri la demando “De kie devenis la homaro”. Sed, bedaŭrinde, la unika specimeno, kiun ni povas vidi hodiaŭ, estas fosilioj eltrovitaj en la 60-aj jaroj, kaj la valoregaj objektoj, eltrovitaj antaŭ 1937, perdiĝis dum la Kontraŭjapana Rezistmito, tial denove serĉi “pekin-homojn” fariĝis arda deziro de multaj arkeologoj.

La serĉantoj antaŭ ĉio venis en la hejmon de “pekin-homoj”, Longgu-monton de Zhoukoudian. Tie verdeco regas sur nordaj kaj okcidentaj montoj. Sur la montoj lirlas klaraj rojoj. Sudoriente de la montoj sterniĝas senlima ebenaĵo. Ĉio ĉi tio asociigas la rigardantojn kun la kampo kaj arbaro ekzistantaj antaŭ centoj da miloj da jaroj, kiam “pekin-homoj” ĉasis bestojn, kolektis manĝaĵojn kaj faris laborilojn:

Sur stepo junuloj kun basto-



Pekin-homo (Busto)

no en la mano postkuris cervon. La besto kuris en paniko al arbaro, kie subite sin ĵetis kelke da homoj embuskintaj, kiuj baris la vojon al la kuranta cervo. Post hajlo da batoj ili havigis al si abundon da manĝaĵoj. Sur montodeklivo virinoj kaj infanoj kolektis manĝeblajn plantojn: Virinoj per pintaj bastonoj fosis manĝeblajn tuberojn kaj infanoj surgrimpis arbojn por pluki sovaĝajn fruktojn. Ĉe riverbordo maljunuloj elektis kaj hakis ŝtonojn kaj tajlis ilin en diversajn laborilojn...

Okcidente, proksime de la loĝloko de “pekin-homoj” estas

ekspona halo, kie eksponiĝas fosilioj de “pekin-homoj”. De ili oni povas scii la bazajn homajn trajtojn: plata frunto, dikaj brovostoj, kiuj ŝirmas la okulojn, buŝo elstaranta antaŭen, larĝa nazalo, altaj zigomoj. Laŭ aspekto ili similas al simio, tamen kun multaj homaj trajtoj. La kapacito de la cerbo de la “pekin-homoj” egalas averaĝe al 80% de tiu de la modernaj homoj, tamen multe pli granda ol tiu de simio. La kapacito de la cerbo de la nunaj simioj egalas averaĝe al ĉ. 40% de tiu de la “pekin-homoj”. La membraj ostoj de “pekin-homoj”, kontraste kun la kranio, estas pli similaj al tiuj de la modernaj homoj. Kvankam iliaj mal-supraj membroj estis iom kurbaj, tamen, dank’ al laborado, iliaj supraj membroj kaj manoj estis preskaŭ same lertaj kiel tiuj de la modernaj homoj.

En la ekspona halo vidiĝas ankaŭ ŝtonaj kaj ostaj laboriloj uzitaj de “pekin-homoj”: hakaj, bataj, skrapaj kaj pikaj, el kiuj la pikaj estas delikataj. Ĝis hodiaŭ oni ankoraŭ ne trovis similajn pintaĵojn en la samtempaj ruinoj de la mondo. Tie oni povas vidi ankaŭ dispecigitajn cervajn kornojn kaj tajlitajn membrajn ostojn de bestoj. Tie troviĝas cerva kranio simila al akvo-ĉerpilo, senigita je korno, vangaj ostoj kaj krania bazo. Oni diris al mi, ke

(Daŭrigo sur p. 37)

Skulpti lignon kaj ŝtonon

de ZHANG SHUANG

S-INO Zhang Jun estas skulptistino. Ŝiaj verkoj metiĝas sur ligna kubo griza. Kaj ŝi staras apude, inter la vizitantoj. Tio vekis ilian intereson pri ŝiaj skulptaĵoj.

La ŝtona skulptaĵo "Grave-do" similas al ĵus elkovita birdeto kun delikataj ostoj kaj humida hararo kvazaŭ tuŝeblaj. La blanka marmoro donas al la artaĵo purecon kaj varmon. Ankaŭ "Burĝonado" estas marmora. Ĝi prezentas la momenton, kiam florbutono fendiĝas en printempo. Tra la sankta beleco oni kvazaŭ flaras ĝian aromon. "Ŝvebo" montras ŝvebadon de petalo al la tero. Zhang Jun utiligis la naturan vejnon de ligno. Oni kvazaŭ vidas la flugon en vento. En ŝia alia ligna skulptaĵo oni vidas: vekiginta vermo, elrampinte el la grundo, rigardas la printempan pejzaĝon kaj la ronda nodo sur la ligno aspektas kiel granda okulo, kiu kontrastas kun la eta vermo. Zhang Jun titolis ĝin "Okulglobo".

Ŝiaj verkoj estas tre simplaj kaj ĉiu havas titolon el nur unu vorto, kiaj "Krizalido", "Korpo", "Vekiĝo" kaj "Burĝonado". Ankaŭ la koloroj estas simplaj: la

blanko de la marmoro kaj la bruno de la ligno. Ĉiuj havas komunan temon: la revigliĝo de la vivo. Tiuj vivestaĵoj estas malgrandaj, tamen fortaj — ili rompas la katenon kaj iras en printempon.

"Mi deziras montri la vivo-forton," diris Zhang Jun. "Tion mi volas sciigi la aliajn per miaj verkoj. Kiam mi lernis en la Centra Belarta Instituto de Ĉinio, la instruistoj ofte menciis esencon. Sako da terpomoj estas tute malsama ol sako da paperoj. Esenco povas grandigi kaj ankaŭ kunpremi la spacon, kion la aŭtoro decidis laŭ bezono de la ideo. Ĉu la esenco estas perfekta aŭ ne, tio decidus sukceson aŭ malsukceson. Mi ne volas, ke mia verko estu simpla ornamaĵo kiel tablotuko."

Estas klare videble, ke Zhang Jun skulptas lignon kaj ŝtonon tiamaniere: poluri ilin aŭ konservi la krudecon. Ŝi opinias, ke glateco kaj krudeco plej taŭgas por montri la novnaskiton. Ligno estas nature bela, tial ŝi ne volas detrui ĝian naturecon. Ŝiaj verkoj ne estas versimilaj, sed iom abstraktaj. Tio venis de ŝia vivsperto.


En 1992 ŝi diplomitiĝis el la Centra Belarta Instituto de Ĉinio




Skulptistino Zhang Jun

kaj eklaboris pri restitudo de antikvaĵoj en la Ĉina Historia Muzeo. Ĉiutage ŝiaj manoj tuŝas fajencaĵojn faritajn de virinoj antaŭ miloj da jaroj per primitiva maniero. Ŝi ŝatas la grandan strukturon de tiuj fajencaĵoj, kies linioj similas al la korpo de ventrodika gravedulino. Tion montras la laŭdo kaj prikantado de antikvuloj al la virino kaj ŝia naskoto. Poste ankaŭ Zhang Jun patriniĝis. Dum la grandigo de la nova vivulo en ŝia korpo kaj post ĝia naskiĝo, ŝi profunde sentis la forton de la vivo kaj trovis, ke ŝi havas komunan senton kun la antikvaj patrinoj, kiuj faris la fajencaĵojn. Tio ŝanĝis ŝian koncepton pri arto. Ŝi deziris trovi novan vojon por esprimi sian vivsperton.

Post la laborhoroj ŝi flegas kaj la filinon kaj aliajn vivestaĵojn — skulptaĵoj el ligno kaj ŝtono. Ŝi donis nomon al tiuj verkoj: *Jingzhe*-serio. *Jingzhe* estas unu el la 24 sunperiodoj de la ĉina luna kalendaro. Kiel oni diras, ĉirkaŭ la 6-a de marto printempa tondro vekas la vintrodormantojn, venas la printempo, ĉiuj estaĵoj vekigatas, la vivo kreskas.




"Levião"



"Švebo"


"Vekião"





"Okulglobo"

"Akumulo"



"Burçonado"

Klareco de la spirito

*Meze de la lago, al lotuso
floranta flugis libelo,
Ĉu pro interrilato, ĉu pro libe-
ro?*

*La arhatoj sub mia peniko
estas tiaj.*

Jen vortoj de pentristo Han Xuanzhen. Ĉe la unua vido al li, oni neniel divenos lian okupon, ĉar li, sen gustoplenaj vestoj kaj misteraj okuloj, aspektas tute ne kiel pentristo. Ofte li sidas tute senmove, apatie. Lia rigardo devigiĝas, kio memorigas pri modeloj en montrofenestro de vestovendejo. Liaj vestoj estas eksmodaj, lia vizaĝo bruna kaj lia mansako neluksa.

Tamen li trovis sian lokon en la pentrista rondo jam en 1989. En tiu jaro li finis sian ĉefverkon “500 Arhatoj” — 58-metre longa pentraĵo. De tiam liaj pentraĵoj pri arhato vekas admiron kaj aplaŭdon. En 1993 ĉina prezidanto Jiang Zemin donacis la pentraĵon “18 Arhatoj” de Han Xuanzhen kiel ŝtatan donaĉon al la bonzo-reĝo de Tajlando.

En Tajlando oni kredas je hinajano, kiu per malgranda veturilo atingos la celon — nirvano. Estas ankaŭ mahajano, kiu atingos la saman celon per granda veturilo. Ili tre ŝatas arhaton — sanktulo, kiu havas nenian ĉagrenon kaj ordinaran deziron, posedas la plej altan saĝon. Arhato estas la plej alta atingo de hina-

jano. Kaj Han Xuanzhen ekhavis rilatojn kun arhato en sia 3-jara restado en Dinglin-templo en Shandong. Li multe lernis de la eminentaj bonzoj kaj tre ŝatis la kvietan vivon en la templo. Tamen li ne fariĝis bonzo, sed daŭre pentras dum vizitoj al la famaj ĉinaj temploj, oriente — en Jihua-monto de Anhui, sude —

en la tradicia ĉina pentrarto. Li lerte pentras kaj libere esprimas — ne plu atentis la luksajn kolorojn, sed ŝatas la plej simplan, tamen plej klasikan manieron uzi nigrajn liniojn. Tia pentrado estas kulmino, al kiu strebas ĉinaj artistoj en miloj da jaroj. Per plej simplaj linioj oni esprimas la plej grandan plezuron de meditado.

Tio postulas, ke la pentristo havu klaran spiriton kaj koron kun nenia deziro. Medito estas religia plezuro, kaj Han esprimas ĝin per belarto. Tio montras ankaŭ lian raviĝon en libereco.

Iu ĉina belarta majstro diris: “Medito estas atingo de ĉinoj, kiuj komprenis la esencon de mahajano, poste klare vidis la profundecon de sia koro kaj fine levis ĝin al filozofio kaj arto.” Han Xuanzhen neniam

faris ion specialan por atingi tian situacion, ĉar li bone konas, ke strebado neniel helpas atingi la klarecon de spirito en medito. Laŭ budhismo, se iu vidas budhecon en sia koro, li estas aŭ estos budho. Tion Han klare komprenas, do li nenion postulas, kiel la libelo fluginta al la lotuso — ĉio dependas de interrilato.

Li forlasis la bruan urbon kaj daŭre vagadas en kampoj kaj montoj. Li montras la klarecon de spirito per arhatoj, kiuj eble tute ne ekzistas. ■



Pentraĵo de Han Xuanzhen


en Putuo-monto de Zhejiang, sudokcidente — en Sichuan kaj Yunnan, nordokcidente — en Maiji-monto, Mogao-kavernaro en Dunhuang... Han Xuanzhen opinias, ke la kvieteco de la temploj estas nur konkreta medio, kaj la klareco en la koro estas plej alta situacio de meditado. Liaj pentraĵoj montras lian komprenon pri la naturo. Komence, li multe pentris naturajn pejzaĝojn kaj atingis altan nivelon. Fininte la pentraĵon “500 Arhatoj”, li pli profunde konis la utilon de linioj

Bunta Golfo

Teksto kaj fotoj de CHEN XI

En Junggar-baseno, nordokcidenta Ĉinio, troviĝas ŝoto kun areo de pli ol dek kvadrataj kilometroj — Bunta Golfo. Tie ne estas rivero nek vilaĝo, tamen ĝi altiras al si multajn vizitantojn per siaj groteskaj kaj buntaj pejzaĝoj. Oni konstatis, ke antaŭ 200 milionoj da jaroj Junggar estis sensala lago. Pro geologia ŝanĝiĝo dum longaj jaroj, la akvofonto sekiĝis kaj aperis multkoloraj ŝtonaj montoj kaj diversformaj valoj. La montoj konsistas el sabloŝtono, siliko, kvarco kaj aliaj, tial ili estas buntaj.

Tie la montoj estas diversformaj. Iuj aspektas tute senĝene kaj aliaj — danĝere, impone. Ĝi ankaŭ estas kvieta loko, oni sentas plezuron pro la blua ĉielo, blankaj nuboj kaj agrabla zefiro.



Surroka turismo



estudo”



“Krokodilo”

Bunta Golfo




INDEKSO DE EPĈ 1998

	Nr.pĝ.		Nr.pĝ.
POLITIKO			
760 milionoj da ĉinoj en balotado	5.38	Gazeto "Malgranda Mastro" kaj ĝiaj mal-	
Hongkong-aj elmigrintoj	8.20	grandaj mastroj	5.44
Makao: baldaŭ hejmen	9.8	Dramo en Ĉinio	7.20
EKONOMIO			
Grupiĝo de ĉinaj entreprenoj	1.20	Familio de bronzaĵ-riparistoj	7.24
Arbarizi kalvajn montojn	1.21	Tabuoj en la ĉina lingvo	9.32
Kulturado en dezerto	2.17	Ĉinoj ŝatas kolektadon	10.40
Haier strebas por mondfamiĝo	2.38	Eŭfemismo en la ĉina lingvo	12.8
Nova provo	3.6	Malpezigi ŝarĝon de la lernantoj	6.4
Ĝardeneska kvartalo sur skoriejo	3.7	Ĉinaj instruistoj en la nova periodo	8.4
Kokosarba grupo-kompanio en disvolviĝo	4.12	Virina mezlernejo en aŭtonoma regiono	11.35
Nova vojo por transporti karbon de norde suden	4.13	La sorto-decida ekzameno	11.40
Reformado en la ŝtataj entreprenoj	5.8	Klareco de la spirito	12.24
Sin liberigi el la kateno de unuopa entreprenado	5.9	Nutraĵo kreita de la spaco	1.5
Ĉinaj tekstilaj industrioj progresos post retiriĝo	6.6	Efika metodo kontraŭ falso	5.40
Denove vigliĝas Wangfujing	6.7	Spaco de imagoj	8.48
Por reformado kaj disvolviĝo	7.6	Heroo de provflugigo de aviadilo	9.36
Natura gaso por Pekino	8.8	Flugo al la spaco	11.8
Ĉu Ĉinio kreskigos la ekonomion je 8%?	8.9	LITERATURO KAJ ARTO	
Entreprenejoj pri medioprotekto	9.6	Maljunulo Sa (Novelo)	2.48
"Silicia Valo" de Ĉinio	10.7	Tri fabloj	6.24
Hidroelektrajo Ertan	10.8	Deziro de edzino (Novelo)	6.24
Akvoutiliga konstruado en Tibeto	11.6	Ĉiopova varo (Popolrakonto de huj-nacio)	7.14
20 jaroj de reformado en la ĉina kamparo	12.28	AMUZO	11.46
Kurantaj aferoj	1-2; 4-7; 9-11	NUNTEMPA BELARTO	12.33
KULTURO, EDUKO, SCIENCO KAJ TEKNIKO			
ĈINA KULTURO			
Anekdotoj pri tigro	1.36	Ponto liganta ĉinan kulturon kun la okcidenta	3.25
Lako kaj lakmetiarto	3.36	Kampano-artisto kaj liaj argilaj metiartaĵoj	6.21
Aludoj en la ĉina lingvo	5.10	Desegnitaj homaj vizaĝoj	9.21
La ĉielo en la okuloj de antikvaj ĉinoj (I)	7.36	Skulpti lignon kaj ŝtonon	12.21
La ĉielo en la okuloj de antikvaj ĉinoj (II)	9.40	SPORTO KAJ HIGIENO	
Salo kaj la ĉina historio	11.36	Revo de ĉinaj piedpilko-maniuloj	1.28
Kolektado de olelampo	1.42	Disvolviĝo de la ĉina vejĉi-ludo	2.44
Kampanino-belartistino	2.28	Vojo al Bermuda	3.42
Ĉarmo de <i>huĉin</i> -istino	3.48	Sportoj en mezlernejo	4.8
Iom pri ĉinaj dialektoj	4.14	Bovlingo en Ĉinio	8.28
Ĉarmo de naciaj kantoj kaj dancoj	5.6	Rakonto pri ŝakludo en la oficejo	10.44
		Nekonataj herooj	12.42
		Saniga ekspreso	1.49
		Post senlaboriĝo	3.4
		Pri medicinaj manĝaĵoj	4.50
		Defianto de la tabua zono de la vivo	5.36
		Li ne bedaŭras	6.50
		En kuracejo por aidesuloj	12.36
		POR VIA SANO	


	Nr.pĝ.		Nr.pĝ.
Pri san-protektado	1.48	Evenkoj kaj boacoj	8.42
San-protektado en printempo	3.49	Ĉinaj rusoj	10.36
Sanprotekto de maljunuloj	5.50	Trafikreto en Guangxi	12.38
Sanprotekto en somero	7.50		
Sanprotekto en aŭtuno	9.50	VOJAĜO KAJ VIDINDAJ LOKOJ	
Sanprotekto en vintro	11.50	Turisma vidindejo Wutai-monto	1.17
SOCIA VIVO		Vojaĝu al ĉinaj turismaj urboj kaj vilaĝoj en 1998	3.20
Pri reformado de kuracaj pagoj	2.4	Huashan-monto en miaj okuloj	4.24
Doktoro de infanĝardeno	3.8	Fuzhou — 2200-jara urbo	8.36
Fondinto de instituto por kripluloj	4.43	Mia vizito al Ningxia	9.4
Filino de la tero	4.48	En Manzhouli	10.25
Nerenkontita amiko	6.40	En la urbo Jiande	10.35
Printempo por maljunuloj	7.46	LAŬ LA SILKA VOJO	
Kia estas via nomo, virinoj?	8.38	Fajro-baseno Turpan	1.29
Kiam vi bezonas urĝan helpon en Ĉinio...	9.14	Ruino de antikvaj regnoj	2.29
Denove pri reenoficiĝo	10.4	Kashi — plej okcidenta urbo de Ĉinio	3.28
Iamaj senlaboriĝintoj stevardas en aviadilo	10.24	Mistera regno Loulan	4.28
Ŝanĝiĝo de grenovendejo	10.28	Petrolurbo en dezerto	5.28
Ŝi elektis pli taŭgan preventmetodon	11.32	Produktejo de jado	6.28
Infanoj en familio sen patro aŭ patrino	12.48	Senfina vojo	7.29
FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO		Adiaŭo al la Silka Vojo	8.29
Aŭtomobilo amortizebla	2.36	EN ĈINAJ URBETOJ	
Iom pri akciloj kaj akcia merkato de Ĉinio	5.46	En urbeto, iama fortreso	1.25
Urbanoj kaj iliaj profesioj	8.40	En urbeto de ledaĵoj	3.21
Adiaŭo al la sistemo de bonstatiga domdistribuo	11.4	Plekti novan vivon per bambuoj	5.21
JUNULARO		Serpento-kultantoj	7.25
Junaj gepatroj	1.6	Ankaŭ tie estas vidindaĵoj	9.24
Debato kaj interŝanĝo	2.40	“Lando de virinoj”	11.25
Li eniris en senvivejon	3.38	HISTORIAJ RESTAĴOJ KAJ ARKEOLOGIO	
Liberaj fraŭloj	4.38	Nova eltrovo de ŝtonkavernoj en Ali	3.16
Modeloj de modernaj junuloj	5.4	Ĉu la homaro naskiĝis en Azio?	4.10
Modo de amuzoj kaj konsumo	6.14	Antikvaj pagodoj en Longyan	5.41
Vivo estas en alia loko	7.40	Atesto pri ĉina prahistorio	6.48
Scienca revolucio bezonas junajn elitojn	8.6	Mebloj de Ming- kaj Qing-dinastioj	8.16
Junaj volontuloj servas en la kamparo	9.16	Ĉinio penadas por historia datado	9.46
Aromo de virinoj	10.38	Regno forgesita de historio	10.48
Iom pri filmoj	11.20	Ĉina mono antaŭ 2 000 jaroj	11.38
Por morgaŭa renkontiĝo	12.6	Serĉi “pekin-homojn”	12.20
NACIOJ KAJ RELIGIOJ		ESPERANTO	
Budhismo en Tibeto	7.16	Kavalirino kaj ŝia kavaliro	1.10
Mongola kuracisto Wu Lan	11.28	Kunlabori rete kaj Esperante	2.12
Luozhui kaj lia familio	12.4	90 jaroj: miraklo!	4.4
MULTNACIA ĈINIO		Ankaŭ pri la kutimo de Esperanto	4.5
Kiam ree sonis la <i>luŝeng</i> -o...	2.24	Memore al Ivo Lapenna, la kreinto de la moderna Esperanto-Movado	5.12
Ĝinooj — nacio trans jarmilo	4.36		
Huoj hieraŭ kaj hodiaŭ	6.36		

	Nr.pĝ.		Nr.pĝ.
Knabina Esperanto-horo	6.16	Nova, alloga invito uzi la ponton	2.11
Montpeliero gastigos la 83-an UK	6.20	Listo de libroj ricevataj de EPĈ kaj ĈEB (II)	3.12
Esperanto en koncentrejo	7.8	Du novaj libroj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo	4.42
Esperanto-instruado en Shandong-universitato	7.9	Libroj eldonitaj de Ĉina Esperanto-Eldonejo (1994-1996)	5.15
Saluton al UEA	7.28	Pri "Analektoj de Konfuceo"; Pri "Paroladoj de D-ro L. L. Zamenhof"	6.11
Esperanto-ekspozicio en Schwelm	9.7	Pri "Ruĝdoma Sonĝo"	7.12
For la kaŝemo!	9.20	Aspiro al sunleviĝo	8.50
Mi amas vin (Poemo)	10.11	Katalogo de ĉinaj eldonaĵoj en Esperanto	10.14
Ĉu Zamenhof scipovis naĝi aŭ navigi?	10.12	ESP-NOVAĴOJ	1-12
Mia aktivado, favore al la Kampanjo 2000	11.14		
Fruktodona 83-a Universala Kongreso de Esperanto	11.16	ALIAJ ASPEKTOJ	
Mia travivaĵo pri Esperanto	12.12	Novjara saluto	1.4
ĈINAJ E-ISTOJ		Popolmuzika festivalo en Finnlando	1.24
Esperanto servu kiel kulturponto	2.8	Besto-protektado en Ĉinio	1.38
Romantikeco kaj praktikemo de Licius	4.16	Amikeco inter homoj kaj ardeoj	2.20
Kontentiĝemulo	6.8	Amantino de arbaro	2.46
Mia maljuna amiko Liu Bingjun	8.10	Kian rolon ludas konfuceanismo en la moderna socio?	3.9
Mastrumado de granda familio	10.10	Konfuceanismo kaj orienta ekonomio	3.10
ORIGINALE VERKITAĴOJ		Manĝetoj de Shaxian-gubernio	5.20
Du nubetoj; Asta	1.12	Eksterlandano lernas ĉinan humuran dialogon	6.38
Tuŝo sur teron; Trapafita militkasko; Tio venas	2.10	Uzado de regeneraj energioj en Ĉinio	7.4
Filozofio kaj realo	3.13	Flora sezono en Kunming	7.48
Floraj amkantoj	4.20	Malbone konata pasio: bredado de kaĝaj kaj flugejaj birdoj	9.10
Du poemoj	5.14	"El Popola Ĉinio" eliras de ĉi tie	9.48
La suno sonĝas	6.10	Verkisto-urbestro	10.50
Du humuraĵoj	7.10	Batalo kontraŭ inundo	12.10
Tri poemoj	9.11	Ŝanĝiĝo de Dabagou	12.16
Poemoj el Vjetnamio	10.13	TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ	
Nia konstante varianta mondo	11.12	Pri "kabaretoj"	1.8
Vojaĝaj notoj	12.13	Bazaj rajtoj de ĉinaj laboruloj	2.6
POR KOMENCANTOJ		Buterteo, oleteo kaj laktoteo	3.24
Lumigi vojon por aliaj	1.15	Ĉinoj kaj Interreto	6.42
Urbo en la okuloj de senmastra kato (Fabelo)	2.15	Ĉu vi konas la ĉinan monon <i>Renminbi</i> ?	8.46
Alko kaj gasmasko	3.15	Pri ĉinaj nomoj	9.42
Hundeto Ade (Fabelo)	4.40	Pri ĉinaj papertondaĵoj	10.17
Aĉeto de kato	5.16	Kiel preventi infektan malsanon en Ĉinio?	11.48
Esperanto kaj familia amo	6.12	Tradiciaj ludoj kaj ludiloj	12.46
Hundido kaj akvo	7.11	EL ĈINAJ GAZETOJ	1-12
Tibor Sekelj — filo de la naturo	8.24	INTER NI	1-12
Tri filinoj (Tatara fabelo)	9.12		
Promeso kiel vento	10.15	SUR LA KOVRILO	
La mantrikita kotonŝtrumpeto	11.13	En frosta vintro	1.1
Vivi honeste	12.14	Impona tamtamado	2.1
SUR NIA LIBROBRETO		Patrino kaj filo	3.1
Libroj ricevataj de EPĈ kaj ĈEB (I)	1.14		

	Nr.pĝ.		Nr.pĝ.
Alilandaj turistoj en mjaŭ-a vilaĝo	4.1	Surdmuta amanto de pekina opero	7.38
Petrolistoj	5.1	Lertaj metiistoj de <i>huĉin-o</i>	9.44
Gajaj infanoj	6.1	Elstara dancistino	10.42
Vilaĝo en printempo	7.1	Posedanto de kaĉo-maĝejo	11.44
Juna instruistino kun siaj lernantoj	8.1		
Flugigo de kajtoj	9.1	FOTOJ	
Familio en terdomo	10.1	Vespera krepusko	1.2
Varma gratulo	11.1	Spirala ŝtuparo	2.2
En montvilaĝo de norda Ĉinio	12.1	Ciklameno	3.2
		La blanka pagodo en luna nokto	4.2
BILDOSERIOJ		Sen titolo	5.2
La mondo en la okuloj de ĉinaj diplomatoj	1.22	Ruino en Yuanmingyuan-ĝardeno	6.2
Legemaj pekinanoj	1.46	La suno leviĝanta	7.2
Por pasigi la Printempan Feston	2.22	Ĉielarko super loĝkvartalo	8.2
Kangding hodiaŭ	3.46	Arbofolioj	9.2
Pupo-skulptisto Xu Zhuchu	4.18	Vespera krepusko de Lijiang-rivero	10.2
Tibet-nacianoj en okcidenta Sichuan	4.25	En aŭtuno	11.2
Lernejestrino Han Yuling	4.46	Montoj, stepo kaj ĉevaloj	12.2
Akrobatika palaco	5.18	ĈINAJ METIARTAĴOJ	
Belaj pejzaĝoj de Jiuzhaigou	5.26	Bronzaĵo kun figuro de rajdanto	1.50
Ĉe la malpermesita Urbo	5.42	Ruĝa skatolo kun gravuritaj drakoj kaj ondoj	3.50
“La Blua Birdo” en Ĉinio	6.17	Suzhou-a brodaĵo: kato kaj manto	5.51
Dazhai hodiaŭ	6.46	Blu-porcelana kruĉo kun flora desegno	7.51
Iam dezerta monto verdigita	7.22	Bambua plektaĵo	9.51
Flegistino Zou Ruifang	7.42	Griloj sur folioj	11.51
Tropika urbo Haikou: por pli bona medio	8.14	ĈINAJ POŜTMARKOJ	
Junuloj en dezerto	8.25	Pentraĵoj de Zheng Banqiao	2.51
Donaco por la infanoj	9.18	Longmen-ŝtonkavernaro	4.51
Disvolvi marajn produktojn	9.34	Pudong	6.51
Montgrimpado de antaŭaj paralizitoj	9.38	Freskoj de Dunhuang	8.51
Cizhou-bakujo hodiaŭ	10.29	Ĉinaj aviadiloj; Ĉinaj aŭtoj	10.51
Mirindaj terdomoj	10.32		
Skulptaĵo el tajlitaj porcelanaj pecoj	11.22	SUR LA DORSKOVRILO	
Flankenglitado de kuraĝuloj	11.33	FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ	
Pejzaĝo de Jinjiang-rivero	12.34	Vintro en Estonio; Montaro en centra Italio	1.52
Utiligo de kalabasoj	12.40	Karnavalaj maskoj en Binche; Karnavalo de Venecio	2.52
HOMARO KAJ NATURO		Preĝejo kun sonorilturo en Hakarp, Svedio; Riegersburgo de Aŭstrio	3.52
Hejmo de cigoj	2.25	Suprenirantaj ombroj; Sen titolo	4.52
Floroj sur montoj ornamas nian vivon	4.21	Urbeto Moret sur Loing apud Parizo; Kaste- lo Herberstein	5.52
Nordorientaj tigroj revenos en la naturon	6.25	Lago ĉe Yinchuan; Fagaro en Olet	6.52
Tri manieroj por transiri Wujiang-riveron	8.21	“Kolorludo”; Sunfloroj	7.52
Regno de vegetaloj	10.20	Niagaraj akvofaloj; Vintra pejzaĝo	8.52
Bunta Golfo	12.25	Rememoro; Aŭstria pejzaĝo	9.52
VESTOJ DE ĈINAJ NACIOJ		Krakovo — malnova urbo; Pejzaĝo en Alpa- montaro	10.52
Vestoj de tibet-naciaj kangba-oj	9.29	Floro; Stepa papaveto	11.52
Kolorriĉaj vestoj de mongoloj	11.29	Mia najbaro en Alaska; Montara izolejo	12.52
ORDINARAJ ĈINOJ			
Instruistino Wan kaj ŝiaj kolegoj	1.40		
Ĉampionino en rulseĝo	3.44		
Flegantoj de novnaskitoj	5.24		



"Sfinkso"



20 jaroj de reformado en la ĉina kamparo

de JI PING

La ekonomia reformado en la ĉina kamparo komenciĝis antaŭ 20 jaroj, kiam la plej granda deziro de la kamparanoj estis havi abundajn vestojn kaj sufiĉajn manĝaĵojn, lumiĝi la ĉambron per elektro, plugi teron per maŝino, loĝi en etaĝdomo kaj komuniki per telefono. De tiam forpasis 20 jaroj kaj ili tute ne atendis, ke la ŝanĝiĝo estas tiel granda.

ŜANĜIĜO DE XIAOGANG

Xiaogang (Ŝjaŭgang), malgranda vilaĝo el 16 familioj en Anhui-provinco, estas fama tra la tuta lando, ĉar ĝuste tie komenciĝis la ekonomia reformado en la ĉina kamparo antaŭ 20 jaroj.

Kion do faris la tieaj kamparanoj? Por diri koncize, la vilaĝo laŭkontrakte distribuis la kampojn de la ŝtato kaj kolektivo al ĉiu familio, ke ĝi kulturu la teron, donu parton de sia rikolto al la ŝtato kiel imposton kaj mem havu la ceteran. Sed antaŭe, sub la rigora sistemo de planizita ekonomio, la kampoj, agrikulturaj maŝinoj kaj brutoj estis prizorgataj de la kolektivo, dum la kamparanoj povis kulturi teron nur laŭ la ŝtata plano, plenumi taskon difinitan de la produkta brigado kaj en la jarfino ricevi grenon kaj monon laŭ sia laboro.

Tiam pro la malalta produktotivelo, en la ĉina kamparo ĝenerale mankis kulturado de ekonomiaj plantoj kaj industria produktado, kaj eĉ tre lertaj kamparanoj enspezis malmulte. Tio malhelpis ilian aktivecon en la laboro. Post kiam la Xiaogang-anoj ekhavis la rajton de entreprenado de la



Legomokulturado en forcejo

kampoj en 1979, la rikoltoj strikte rilatis kun iliaj propraj interesoj, tial ili ne bezonis alies instigon kaj kontrolon, sed mem aranĝis laboron kaj kulturis la teron diligente kaj zorgeme. La fakto pruvis, ke tio estis konforma al la naciaj kondiĉoj de Ĉinio. En tiu jaro, kvankam Xiaogang-vilaĝo suferis trosekecon, oni ankoraŭ ricevis riĉan rikolton de greno.





En la sekvintaj 20 jaroj la ĉina kamparo spertis la transiron de planizita ekonomio en la merkatan. Kamparanoj diris, ke tio celas vigligon de la ekonomio. Praktikante la sistemon de laŭkontraktita produktado, la ŝtato efektivigis serion da politikoj favore al la kampara ekonomio, ekz. dum longa tempo ne ŝanĝiĝos la politiko pri laŭkontraktita produktado, por ke la kontraktantoj el-laboru produktan planon por longa tempo kaj volonte investu al la kampa kulturado; la ŝtato perme-

sas al la kamparanoj vendi sian superfluan grenon post pagado de la imposto; la ŝtato stimulas produktadon de greno kaj kulturadon de ekonomiaj plantoj laŭ la lokaj kondiĉoj. Ekzemple, en Danzhou de Hubei-provinco la klimato kaj grundo estas taŭgaj por kulturi oranĝarbojn kaj kotonujojn, tamen antaŭe laŭ difino de la ŝtato oni rajtis kulturi nur grenon. Nun tieaj kamparanoj kulturas rizon, oranĝarbojn kaj kotonujojn, ĉiu po 1/3 de la tero.

ĈU TIO ESTAS URBO AŬ VILAĜO ?

Vizitante vilaĝon en Guangdong, oni ofte demandas: "Ĉu tio estas urbo aŭ vilaĝo?" Tie kaj sterniĝas senlima kampo kaj arbore staras fabrikkompoj. Iu kamparano diris al mi, ke en la vilaĝo nur dekkelkaj homoj sin okupas je kulturado de greno kaj aliaj laboras en fabrikoj. Post la

Diagramo pri agrokulturaj kaj brutaj produktokvantoj de Ĉinio



naskiĝo de vilaĝaj entreprenoj en iuj lokoj de Ĉinio oni jam mal-facile distingas tie laboristojn de kamparanoj.

La prospero de vilaĝaj entreprenoj multe akcelis la kamparan ekonomion. Pro merkata bezono kaj bona administrado multaj el ili fariĝis famaj entreprenoj. Ekz. la Limigita Kompanio de Elektraj Aparatoj Kelong en Rongqi, Guangdong-provinco, estas unu el la plej grandaj fabrikoj de fridujo en Ĉinio. En ĝia ĝardeneska fabriko staras altaj domoj kaj modernaj instalaĵoj. Ĝin vizitante, oni nature demandas: "Ĉu tio estas vilaĝa entreprenoj?"

Multaj superfluaĵ laborfortoj en la kamparo eniris en vilaĝajn entreprenojn kaj grandaj kapitaloj estis investitaj al la agrikultura produktado. Sole Hengdian-korporacio de Zhejiang-provinco elspezis en la lastaj jaroj milionon da juanoj por agrikultura akvoutiliga konstruado kaj fabrikado de agrikulturaj maŝinoj. Nun la tieaj agroj estas kulturataj de kelke da spertaj kamparanoj. Dank' al leviĝo de la mekaniza nivelo, multe pligrandiĝis la gren-produkta skalo.

Antaŭe la kamparanoj enviis

la urban vivon, tamen hodiaŭ la kampara vivo estas enviata de urbanoj, ĉar en la kamparo la aero estas freŝa, loĝdomoj vastaj kaj fridujoj, televidiloj, klimatiziloj, telefonoj k.a. estas vaste uzataj kiel tiuj en la urboj. Kamparano Tan Fuwen diris: "Ĉe ni la vivo estas tute sama kiel tiu en urboj. Matene mi akompanas mian infanon al lernejo kaj post tio iras al fabriko kune kun mia edzino. Mia patrino jam emeritiĝis kaj ŝi

iras al parko por korpa ekzerco ĉiumatene. En tagmezo mi kaj mia edzino revenas hejmen. Tiam mia patrino jam aĉetis legomojn en la vilaĝa foiro. Post vespermanĝo ni promenas en parko aŭ amuziĝas en klubo." Kiu ja scias pri la diferenco de la vivo inter ili kaj urbanoj?!


PERSPEKTIVO DE LA ĈINA AGRIKULTURO

En Ĉinio vivas 800 milionoj da kamparanoj. La kampara ekonomio strikte rilatas kun la ĉina ekonomio kaj la kampara stabileco decidas la tutlandan. Alivorte, se la kamparanoj vivas pli bonan vivon, do la plejparto de la ĉinoj vivos bone. Iasence, la ekonomia reformado en la ĉina kamparo dum la pasintaj 20 jaroj donis al la tuta lando tiun ŝancon. La urbanoj ĉerpas spertojn de la kampara reformado kaj uzas ilin en alisfera reformado. Samtempe kun tio la ĉina kamparo nun faras novan revolucion, t.e. industrian revolucion kun sciencoj kaj teknikoj kiel la movfortoj.

Nun la kamparanoj donas grandan atenton al agrikulturo tridimensia, altefika kaj ekolo-

Kulturado sur lago





Rikolto

gia. Estas Zhaibei-vilaĝo sur malvarma altebenaĵo. La tieaj kamparanoj kulturis novrasan rizon, proponitan de agronomoj, sterkis la teron kaj uzis plastmembranajn tegaĵojn laŭ novaj manieroj, tiel ke malvarmo ne plu malhelpis kreskon de rizo, kaj ĝia hektara produktokvanto leviĝis je 80%. En Shanxi-provinco, kie


grave mankas akvo, sciencistoj kaj teknikistoj helpis tieajn kamparanojn en flueta irigacio kaj dank' al tio ili ŝparis grandan monsumon por konstrui akvokonservejon kaj solvis la problemon pri irigaciado.

Greno estas malmultekosta, tial la kamparanoj de grenaj bazoj donas grandan atenton al

prilaboro de agrokulturaj produktaĵoj. En Henan-provinco oni delikate prilaboras rizon kaj preparas el ĝi multe da manĝaĵoj ŝatataj de la konsumantoj, ŝanĝas krudan rizbranon en industrian materialon, elpremas oleon el delikata brano kaj ekstraktas medikament-materialon el la rekremento. En multaj frukto-




Aplikado de maŝinoj



Grenejo

Monto da kotono

En tempo por rikolti pomojn



bazoj oni faras trinkaĵojn, ladmanĝaĵojn k.a. el fruktoj.

Oni bone scias, ke en Ĉinio la loĝantoj kreskas, dum la agroj malpliigas. Por nutri miliardon da loĝantoj oni nepre devas disvolvi sciencan kaj teknikan. Nun la kampara reformado en Ĉinio jam metis solidan bazon por la agrikultura progreso. ■



Herbo-plektado



Cervo-bredado




Novaj loĝejoj de
kamparanoj

Serpento

Serpento tre ŝatis sin etendi, tamen ĝia nesto estis tre malvasta, ke ĝi devis volviĝi tie. Se ĝi volis sin etendi, ĝi devis elrampi el la nesto. Sed ĝi timis homon. Do ĝi deziris serĉi taŭgan neston por sin etendi, sed ne trovis.

Iutage, la serpento renkontis elefanton kaj trovis, ke la rostro de la elefanto estas tre longa kaj sufiĉa por ĝia etendiĝo. Ĝi do rampis en la rostron kaj laŭvole sin etendis. La elefanto sentis fortan jukadon en la rostro kaj ternegis, ke la serpento estis elĵetita je dekelkaj metroj for kaj kuŝis surtere senmova de terura doloro.

Alia serpento venis tien kaj demandis, kial ĝi tiel suferas. Informiĝinte pri la okazaĵo, ĝi diris: “Se vi volas ĝui tro multe, vi certe suferas pro tio.”



Tineo kaj araneo

Tineo neatendite trafis en araneaĵon. La araneo tuj venis por manĝi ĝin. La tineo forte baraktis, tamen ne povis eskapi. La araneo triumfe diris: “Tre bone, tre bone.” Aŭdinte tion, la tineo petegis la araneon: “Ne manĝu min. Mi serĉos iun grasan por vi. Ĉu vi volas?” La araneo kredis kaj liberigis ĝin.

Survoje la tineo renkontis abelon kaj diris al ĝi: “Ie estas aromaj floroj. Se vi volas, mi servos al vi kiel voĵgvidanto.” La abelo ĝojege sekvis la tineon.

Proksime de la araneaĵo, la tineo haltis kaj diris: “Jen la loko. Vi mem iru tien.” Aŭdinte tion, la abelo rapide flugis antaŭen, kaj tuj trafis en la araneaĵon. Apude la tineo kriis al la araneo: “Jen mia rekompenco por vi.”

La araneo tre ĝojis, tuj sin ĵetis al la abelo.

Neatendite, la abelo eligis sian pikilon kaj plene forte pikis la araneon. La araneo doloregis. La tineo gaje ekdancis kaj triumfe diris: “Tre bone, tre bone.”

Lerni de krokodilo

Geko ofte rampas sur muro kaj kaptas muŝojn, moskitojn kaj aliajn, kiuj atakas homojn.

Iutage, la geko promenis ĉe riverbordo kaj surpriziĝis vidinte, ke krokodilo en la rivero tre similas al ĝi. La geko proksimiĝis al la krokodilo kaj demandis: “Ĉu ni estas samspeculoj? Kial vi estas tiel granda?” La krokodilo ne volis parolis kun la geko pro ĝia malgrandeco. Nur post kiam la geko sincere ripetis la demandon, la krokodilo indiferece respondis: “Mi fariĝas granda pro tio, ke mi manĝas homojn.” Dirinte, ĝi subakviĝis.

La geko pli forte surpriziĝis kaj volis enakviĝi. Ĝia kamarado malhelpis ĝin: “Via korpo estas malpli granda ol la piedo de la krokodilo. Kiel do vi povas elteni la torenton? En la akvo vi dronos. Se vi insistas, do vi devas unue grandiĝi kiel ĝi.”

La geko diris: “Vi estas prava. Mi devas ĉiamaniere grandiĝi min.” Do ĝi profunde enspiris, pene pufigis sin kaj demandis: “Ĉu mi estas granda kiel ĝi?” La kamarado ridis: “Ankoraŭ ne.” La geko ne perdis memfidon, foje kaj refoje streĉis sian forton por ŝveligi sin, tamen ricevis ankoraŭ la saman respondon. Fine la geko suspiris: “Ĉar la krokodilo manĝas homojn, ĝi grandiĝis. Mi provu.” Do, la geko ne plu kaptis fiinsektojn, sed saltis sur la brakon de homo kaj mordis lin. La homo surpriziĝis kaj frapis ĝin. Ĝi vundiĝis kaj falis sur la teron.





Pejzaĝo de Jinjiang-rivero

Teksto de HAN HONG


Fotoj de ZHOU MENGQI

Loĝkvartalo ĉe la rivero

Chengdu, ĉefurbo de Si-chuan-provinco, estas trafluata de Jinjiang-rivero, kiu plaĉas al la urbanoj pro tio, ke la rivero ornamas tiun urbon, kvazaŭ donante al ĝi printempan pejzaĝon.

Chengdu kun granda loĝantaro, evoluinta industrio kaj multaj konstruoj havas longan historion, tamen pro malnoviĝo de urbaj instalaĵoj,

Ĝuado de la rivera pejzaĝo



Malnova aspekto de la rivero

Jinjiang-rivero estis peze ŝarĝita. Tio kaŭzis digo-difektiĝon, riveran ŝlimadon kaj median polucion, malhelpis modernigan konstruadon en

Foto de Han Hong

Chengdu kaj malbonigis la vivon kaj sanon de milionoj da urbanoj en la malsupra baseno de la rivero. Konsiderante tion, la registaro de Chengdu decidis fari

kompletan transformadon, inkl. transloĝiĝon, bridon de inundo, mildigon de polucio, verdigon kaj trafikan konstruadon. Kun partopreno de milionoj da urbanoj, la kvarjara transformado komplete ŝanĝis la urban aspekton, la loĝantoj ĉe la rivero jam transloĝiĝis en novajn loĝkvartalojn, sur la riverbordo aperis verdejo de 27 hektaroj kun 20 000 arboj, la verdejo kaj rivero fariĝis natura pejzaĝo, la ekologia medio pliboniĝis, la ĝardenoj ĉe la rivero ornamitaj per verdaĵoj prezentas al la urbanoj amuzajn lokojn.

En kuracejo por aidesuloj

ANTAŬE You'an-hospitalo de Pekino servis ekskluzive por suferantoj de infektaj malsanoj. En 1990 ĝi akceptis aidesulon kaj post tio ĝi instalas specialan kuracejon por aidesuloj.

Iun malvarman posttagmezon mi venis al la hospitalo kaj eniris la izolitan kuracejon. En ĝi mi vidis, ke ĉio estas neĝblanka, ĉu muroj, ĉu litkovriloj, ĉu vestoj.

La kuracejo konsistas el ses ĉambroj, ĉiu kun necesejo. Pri la kuracejo respondecas ĉefkuracisto Xu Lianzhi. Antaŭ 40 jaroj ŝi ekokupis sin pri kuracado de infektaj malsanoj. Ŝi ĝuas bonan reputacion pro kuraco de aideso. Kaj per sia bonkoreco kaj helpemo ŝi estas profunde amata de la pacientoj.

Kiam mi estis en la kuracejo, du aidesuloj estis kuracataj. Mi vidis, ke iu marasma paciento en la ĉambro n-ro 1 aspektas vigla. Kun rideto li leviĝis kaj petis min sidiĝi. Apenaŭ li malfermis la buŝon, li detenis sian voĉon kaj sur la vizaĝo legiĝis embaraso. Je la momento kuracisto Xu diris: "Rigardu, kiom grandan dispozicion s-ro Zhang havas? Sur la muroj pendas tiom belaj pejzaĝoj!"

Rigardante la kvar pentraĵojn sur la muroj, li denove ekridis, dirante: "Kuŝante en la lito, mi povas vidi ilin en ĉiu ajn direkto."

Li ofte febris je pli ol 39 gradoj C kaj suferis de laksado. Kuracite de Xu, lia malsano mildiĝis, tamen li perdis apetiton. Por havigi al li la apetiton liaj kuracistoj kaj flegistinoj venigis nutradiston kaj iam mem preparis manĝaĵojn por li.

"Feliĉe, mi havas bonajn kuracistojn kaj flegistinojn." Li menciis iliajn nomojn kaj kun emocio konigis pri ilia zorgema servo. Li estis entreprenisto. Antaŭ tri jaroj li malsaniĝis je aideso pro eksteredzeca konduto. Tuj leviĝis riproĉoj kontraŭ li. Oni ne plu respektis lin, sed laŭeble evitis lin. Liaj kolegoj riproĉis lin, ke li malvirtigis kaj petis eklogi lin. Nelonge poste, ne povante elteni la spiritan baton, lia edzino subite mortis de kormalsano. Li plurfoje provis sin mortigi. Kiam liaj familianoj enhospitaligis lin, li diris al kuracistoj



Kuracisto Xu Lianzhi

kaj flegistinoj, ke li volas nenion alian ol morti kiel eble plej baldaŭ. La kuracistoj kaj flegistinoj tagnokte flegis lin, dirante al li foje-refoje: "Bone efikas sur aidesulojn la kunmiksitaĵa terapio populara uzata internacie kaj ĉinaj medikamentoj. Aideso ne signifas morton." Fine rideto denove ludis sur lia vizaĝo. Li diris: "Post la malsaniĝo miaj gepatroj multe flegis min, sed postulis, ke mi mem purigu mian manĝilaron. Post mia enhospitaliĝo flegistinoj servas al mi en tio." Elirinte el lia ĉambro, kuracisto Xu mallaŭte diris: "La aidesuloj estas pli feblaj kaj pli sentemaj ol aliaj malsanuloj, kaj ni devas fari laŭeble pli multe por ili, ke ili sentu sin kiel hejme."

Antaŭvespere de mia vizito tie okazis amuzkunveno. La kuracistoj kaj flegistinoj regalis la pacientojn per bombonoj kaj bakitaj akvomelonaj semoj. Kuracisto Xu kantis la unua por ili, ke


Xiao Meng, sidante apud ŝi, ekploris de emocio. Ŝi diris, ke la kuracejo estas ŝia hejmo kaj kuracisto Xu — ŝia panjo.

“Ĉu vi ne timas labori ĉi tie?” mi demandis flegistinon Huang.

“Ni estas trejnitaj kaj bone scias, kiamaniere aideso infektas. Ni ne estos infektitaj je aideso, se ni severe observas la regulojn de flegado. Tamen, ni ankoraŭ estas timemaj antaŭ eventuala neatenditaĵo.”

La aidesuloj ne havas bonan humoron. La malsanuloj en lasta aideso facile malesperas pri sia resaniĝo. Iuj rifuzas kuracadon, aliaj kverelas pro granda ĉaĝeniĝo. Decembre de 1997, enhospitaliĝis aidesulo en danĝero de la vivo kaj kun gravaj litulceroj sur la korpo. La flegistinoj senprokraste purigis al li la korpon, antaŭ ol kuraci la ulcerojn. Kiam li malfacile spiris, ili foje-foje suĉis mukaĵon per aspiratoro.

Kompreneble, flegi aidesulojn estas danĝera



Kunsidas kuracistoj kaj pacientoj.



Xu Lianzhi faras korpo-ekzamenon.

iagrade. Krom penige servi, oni ankaŭ eltenas maljustan traktadon. Nun en Ĉinio multaj ne bone komprenas la signifon de kuraco de aideso, opiniante, ke oni suferas de aideso ĉefe pro siaj malvirtaj kondutoj. Laŭ ili, tute ne indas por la kuracistoj kaj flegistinoj riskante la vivon servi al tiuj aidesuloj, kiuj damaĝis la socion kaj siajn familianojn.

Kuracisto Xu opinias: “Ni kuracistoj servas al malsanuloj kaj ankaŭ al la tuta socio. Ni faras ĉion eblan, por ke ili suferu malmulte kaj havu pli da ĝojo en la lasta vivo kaj pli da amo al la socio.”

La ago de kuracisto Xu kaj ŝiaj kolegoj profunde kortuŝis la pacientojn kaj iliajn familianojn. Xiao Meng kun memproĉo diris al sia amiko: “Antaŭe, kiam mi vidis, ke multaj traktas nin aidesulojn malvarme, mi pensis repage infekti al ili aideson. Kaj nun mi komprenas, ke mia penso estas tute malĝusta.”

Por la aidesuloj fizika turmentado estas timiga kaj la mensa des pli. Sed ĉio en la kuracejo pensigis min, ke aideso, verŝajne, ne estos tiom timiga, se pli da homoj traktos aidesulojn varme, kiel kuracisto Xu kaj aliaj. ■

(Daŭrigo de p. 20)

tie la nombro de similaj specimenoj bone tajlitaj kaj en sama formo estas ĉ. 100. De tio oni divenis, ke “pekin-homoj” uzis ilin kiel akvo-ĉerpilon. Tie estas ankaŭ bestaj ostoj kaj ŝtonoj fajre bruligitaj. Tiuj eltrovaĵoj pruvas, ke la homoj ekuzis fajron antaŭ

500 000 jaroj, pli frue je centoj da miloj da jaroj, ol kiom en historia libro siatempe.

La eksponaĵoj en la halo estas nur malgranda parto de la arkeologiaj fruktoj dum jardekoj kaj oni ne scias, kie sin kaŝas pli multaj “pekin-homoj”. Tamen estas multe da novaj informoj pri ili.

Oni deziras, ke ie en Pekino estu elterigitaj trezoroj. Tamen estas ankaŭ homoj, kiuj diris, ke tiuj trezoroj estis transportitaj alilanden en la militaj jaroj. Kvankam la arkeologoj scias, ke estas ne facile trovi “pekin-homojn”, tamen ili restas firmvolaj en plenumo de tiu ĉi grava tasko. ■

Trafikreto en Guangxi

de WEI GUOXIONG

AMBAŬBORDE de Lijiang-rivero ondas montoj kun altaj krutaĵoj. Kiam oni ŝipas en pluva tago sur la rivero borderita de montoj en nebulo, oni sentas sin kvazaŭ en lando de feinoj. Je la momento, fascinata, oni ja konas la urbon Guilin kaj la regionon Guangxi.

Guangxi famas en- kaj eksterlande pro Lijiang-rivero. Sed, antaŭe ĉiuj turistoj kaj investantoj ofte sentis grandan bedaŭron pro ĝia malfacila trafiko, kiu malhelpis al ĝi la disvolviĝon de ekonomio. Ĉinio havas 16 milionojn da ĝuŝang-oj, inter kiuj 13 milionoj loĝas en Guangxi. En 1958 fondiĝis la Guangxi-a Ĝuŝang-nacia Aŭtonoma Regiono. De tiam la regiona registaro alte taksis la konstruadon de trafikreto en la regiono, cele rapidigi la disvolviĝon de ekonomio kaj altigi la vivnivelon de la loĝantoj. Post 1978 la rimarkinde granda monsumo, asignita de la registaro por la konstruado, rikoltis bonan efikon. Kaj nun bone funkcias en Guangxi ŝoseoj, fervojoj, akvovojoj kaj aerlinioj.


FACILA TRAFIKO EN GUANGXI

En Guangxi multas montoj kaj riveroj. Sekve, vojkonstruado en ĝi malfacilis kaj postulis pli da mono. Ĉiujare de post 1978, la regiona registaro asignas ĉ. miliardon da juanoj por vojkonstruado. Krom ŝoseorekonstruado, oni lanĉis ankaŭ trunkajn ŝoseojn al industriaj bazoj, havenoj kaj tu-

rismejoj. En la regiono etendiĝas ŝoseoj kun totala longo de 45 378 km, kiuj trakuras preskaŭ ĉiujn ĝiajn urbetojn kaj vilaĝojn.

En Guangxi funkcias pli ol 40 akvovojoj, navigeblaj tutjare, kun totala longo de 4 035 km. Krom dragi la riverojn, la centra kaj regiona registaroj asignis monsumon ankaŭ por du grandaj akvoutiligaj konstruoj, tiel ke 1 000-tonelaj ŝipoj povas iri tutjare sur la 847-kilometra navigovojo ligita kun la najbara provinco Guangdong.

Antaŭe en la regiono ne man-



Ŝoseo en montregiono en norda Guangxi

is pramejoj. Sed nun ilin oni ne bezonas por transiri riveron, ĉar super la riveroj kuŝas diversaj pontoj. Unu el ili estas giganta arkponto super Yongjiang-rivero. Ĝi, kun spano larĝa je 312 m, estas projektita kaj konstruita per internacie avangarda tekniko.

FERVOJO — ANTAŬIRANTO POR PORDOMALFERMO

En 1997 ekfunkciis la 898-

kilometra Nanning-Kunming-a Fervojo, kies konstruado komenciĝis en 1990. Vidante la trajnon unuafoje en la vivo, la montanoj estis ekster si de ĝojo. Konvinkite de la diro “Fervojo — vojo al riĉiĝo”, ili esperis, ke la fervojo forportos la malriĉecon, kiu akompanis ilin dum centoj da jaroj.

La fervojo trakuras la regionon Guangxi je 353 km kaj 30% de ĝi estas en Bose, mezgranda urbo subevoluinta, riĉa je mineraloj, industriaj plantoj kaj fruktarboj, sed sen kontaktoj kun la ekstera mondo. Antaŭ ekfunkciado de la fervojo, lokanoj konstruis ŝoseojn. En ses jaroj ili interligis la vilaĝajn ŝoseojn kun la trunkaj kaj la lastajn kun fervojoj, per kiuj multaj produktoj de Bose transportiĝas aliloken, kio diskonigis la urbon kaj allogis al ĝi investantojn en- kaj eksterlandajn.

En Nanning, ĉefurbo de la Guangxi-a Ĝuŝang-nacia Aŭtonoma Regiono, ekfunkciis samtempe kun la fervojo la plej granda klasifikejo en sudokcidenta Ĉinio. El ĝi transportiĝas granda kvanto da varoj al aliaj lokoj. Tie estas lanĉitaj 371 novaj fervojlinioj. Dank’ al tio, rapide disvolviĝis komerca, manĝaĵa kaj aliaj industrioj. Statistiko montras, ke Nanning havas komercajn rilatojn kun plejparto da provincoj kaj urboj de Ĉinio kaj ankaŭ kun Singapuro, Vjetnamio, Tajlando, Birmo kaj aliaj sudorientaziaj landoj. Ĉiutage al la komercurbo Ping-



Kontenera kajo en suda Guangxi

xiang, najbara al Vjetnamio, venas vagonaroj kun vivbezonaĵoj kaj al ĝi transportiĝas multaj varoj el Vjetnamio, kiaj ligno kaj drogherboj, al Nanning kaj aliaj lokoj de Ĉinio.

ĈEMARAJ HAVENURBOJ

Guangxi havas zigzagan marbordon longan je 1 590 km. Ĉe la maro sidas la havenurboj Fangchenggang, Qinzhou kaj Beihai.

Inter la tri urboj Fangchenggang estas la plej granda kun plej malgranda loĝantaro. En 1968 la ŝtato investis por konstrui ĝian unuan dokon. Nun tie estas 25 ankrejoj kun la jara ŝarĝ-malŝarĝa kvanto de 6.3 milionoj da tunoj, pli granda ol tiu de iu ajn el la du aliaj. Ili tri servas kiel elirejoj de sudokcidenta Ĉinio al la maro.

En la pasinteco la eksportaĵoj de sudokcidenta Ĉinio plejparte

estis transportitaj al aliaj lokoj per Yangzi-rivero. Nun la Nanning-Kunming-a Fervojo multe faciligas la transportadon de eksportaĵoj en la loko. S-ro Ye Shixiang, estro de la havena buroo de Fangchenggang, diris, ke granda kvanto da eksportaĵoj de sudokcidenta Ĉinio estas malmultekostaj, kiaj cemento kaj fosforaj ercoj, kaj importaĵoj estas ĉefe fiŝpulvoro kaj feraj ercoj. Pro tio, grandigi la ŝarĝ-malŝarĝan povon estas ideala vojo por malaltigi la koston kaj altigi la ekonomian efikon. Nun en Fangchenggang estas konstruata 100 000-tonela doko, profundigata naviga kanalo kaj intensigata mekanizado de ŝarĝo kaj malŝarĝo en la haveno.

La prosperiĝo de urbo ne disigblas de la disvolviĝo de ties haveno. Ni ekzemplu la urbon Qinzhou. Kvar jarojn post la

malfermiĝo de la haveno, ĝi disvolviĝis pli rapide ol en la antaŭaj 10 jaroj. Kiel Qinzhou-anoj diris, sen haveno ne estus la urbo nek ĝia dogano.


Laŭ iuj fakuloj, preferindas koncentri kapitalon por disvolvi la lokon, kie estas la tri havenurboj, ol malkoncentri ĝin aparte por ĉiu el ili. Surbaze de tio, oni elpensis antaŭ nelonge perspektivan projekton: Starigi havenurban komunumon, kune kolekti kapitalon, racie distribui varojn kaj utiligi investojn por kunordigi la disvolviĝon de la havenurboj sub la unueca planado de la aŭtonoma regiono.

Per la trafikreto oni interligas Guangxi kun aliaj lokoj de Ĉinio kaj eĉ la mondo. Tio metis solidan fundamenton por disvolvi la regionon. Dank' al tio, la loka ekonomio disvolviĝos rapide kiel dezirate. ■



Utiligo de kalabasoj

Fotoj de DOU SHICHANG




Diversformaj kalabasoj

En Ĉinio kultivado de kalabasoj havas historion de kelkmil jaroj. Linqu-gubernio de Shandong-provinco estas unu el la plej fruaj kultivejoj de kalabasoj.

En Linqu, kiam venas aŭtuno, ĉu en kampoj, ĉu apud vojoj, ĉu en kortoj, ĉie videblas kalabasoj grandaj kaj malgrandaj.


El sekaj kalabasoj fareblas kruĉoj, kuirejaj uzaĵoj, muzikiloj, mezur-

iloj k.a. Artistoj faras sur kalabasoj gravuraĵojn kaj pentraĵojn. Ili faras ankaŭ argilaĵojn kaj fajencaĵojn en formo de kalabasoj. Kalabasaj artaĵoj de Linqu vendiĝas ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en Malajzio, Singapuro kaj aliaj landoj.





Lingu-anoj havas la kutimon donaci al novedzino paron da ruĝe kolorigitaj kalabaso.



Bongustas vino el kalabasa kruĉo.



Ŝi frapas kalabason kiel tamburon.

Nekonataj herooj

KVANKAM en nomlisto de grupo de montgrimpistoj ne estas nomoj de iliaj asistantoj, tamen ĉi tiuj estas nemankigeblaj por la grupo. Oni povas diri, ke preskaŭ en ĉiu venko en montgrimpado estas iliaj kontribuoj. Jen rakontoj pri du asistantoj de montgrimpistoj.

TIBETA ASISTANTO

Li estas estro de la asistanta grupo. Sed en la grupo oni scias nur, ke li estas tibetano, kaj neniom pri liaj nomo, hejmloko kaj aĝo. Por simpligi la rakonton ni nomas lin S.

Foje S kaj aliaj asistantoj helpis iun alilandan grupon surgrimpiti la montpinton Qogir en la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono de Ĉinio. Kun alto de 8 611 metroj super la marnivelo ĝi estas la dua alta montpinto en la mondo. Ili rajdis sur kameloj 8 tagojn kaj atingis la kampadejon ĉe piedo de la monto. Poste, S kaj aliaj asistantoj dorse portis sakojn kun oksigeno, manĝaĵojn, grimpekipaĵojn k.a. al la kampadejo 8 000 metrojn super la marnivelo.

Lavango okazis en la lasta nokto antaŭ ol ili ekiris. Tiam ĉiuj montgrimpistoj, S kaj liaj kolegoj estis dormantaj. Subite, S vekigis de stranga brueto mallaŭta kaj obtuza. Laŭ sia sperto li sciigis, ke lavango okazos, amaso da neĝo falos kaj ĉiuj estos englutitaj de neĝo.

Li laŭte kriis, tranĉis la dormosakon kaj tendon kaj vekis ĉiujn grupanojn. Apenaŭ ili foriris de la loko, lavango falis. La grupanoj estis savitaj, tamen neatendite li glitis de sur la krutaĵo.

Oni trovis lin en 500-metro-profunda loko sub la krutaĵo, kiam li tre malforte spiris. Oni pensis, ke li baldaŭ mortos, kaj ne sciis, kiom da tagoj

estos bezonataj por porti lin al hospitalo kaj kio neatendita okazos survoje. Sed, kiel savi lin ĉeloke? Multaj grupanoj ploris kaj preĝis por li.

Post 2 tagoj li malfermis la okulojn, 3 tagojn poste, li povis distingi inter homoj. Sed lia kapo duoble ŝveliĝis, liaj okuloj estis fermitaj de ŝvelado. Post 10 tagoj li kune kun la grupanoj grimpis sur la 8 000-metran kampadejon kaj akompanis la montgrimpistojn al la pinto.

NEPALA ASISTANTO

Alia asistanto estas nepalano. Fakte, kiam ni parolas pri montgrimpistoj, ne gravas iliaj ŝtataneco, nacidveno, nomo, ĉar kiam ili konkeras monton, ili montras la forton de la homaro. Krom la homaro kaj naturo, nenio alia gravas.

Ŝajne, la nepalano estas denaska montgrimpisto. Li diris, ke li taŭgas por vivi en neniu alia loko ol en altaj montoj. En loko sub 7 000 metroj super la marnivelo li estas ĉiam dormema. Li ŝatas drinki, kaj ĉiufoje antaŭ ol montgrimpiti, li ensakigis botelojn kun alkoholaĵo.

Sur la suda deklivo de Qomolangma estas danĝera glacirivero. Se la glacio degelas, aŭ tropezas, ĝi disfalos. Antaŭ montgrimpado oni gardas fore de la glacirivero por observi ĝian ŝanĝiĝon. Laŭ regulo oni devas transpasi ĝin antaŭtagmeze, kiam la glacio ankoraŭ ne degelas. Li ne timas la glaciriveron. Ĉiufoje, antaŭ ol transpasi la glaciriveron, li drinkis kaj poste li kun duone fermitaj okuloj ŝanceliĝe iris al la glacirivero. Liaj kolegoj estis zorgemaj pri li, ĉar se li falus en la glaciriveron, li mortus de frosto. Tial ĉiufoje oni helpis lin transpasi la glaciriveron.

Tamen en loko pli-ol-7 000-metro-alta, kiam



Grimpado

oni suferas de alta altitudo, li aparte vigliĝas. En la “malpermesita regiono de la vivo” 8 000 metrojn super la marnivelo, li ankaŭ kuraĝas drinki, ofte li kaj drinkas kaj montgrimpas. Li jam 6-foje grimpis sur Qomolangma. Por li tio facilas kiel hejmenreveno. Foje montgrimrado finiĝis, tamen iu grupano ne volis foriri, ĉar li ankoraŭ ne atingis la pinton. Informiĝinte pri tio, la nepalano diris al li: “Preparu alkoholaĵon, mi akompanu vin por realigi vian deziron.” Li dorse portis sakojn kun oksigeno kaj manĝaĵojn kaj surgrimpis la pinton kun la grupano.

Tamen, en la lokoj sub 7 000 metroj super la marnivelo li ne estas tiel ĝoja. Foje, la nepala reĝo surŝultrigis al li orbrilan skarpon kaj laŭdis lin nacia heroo. Sed por faciligi drinkadon, li formetis la skarpon. Alifoje en bankedo, li senpaciencie falis sur la plankon. La mastro opiniis, ke li malsaniĝis, dume lia kolego kun rido donis al li botelon da alkoholaĵo. Oni scias, ke nur monto kaj alkoholaĵo povas ĝojigi lin. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizo kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Ge Tao, 19-j. studentino, dez. kor. tm. pri diversaj temoj. Adr.: Dazhuan 991-ban, Jinhua Shifan Xuexiao, CN-321000 Jinhua, Zhejiang, Ĉinio. Hejme: Chen Sishou, Guangqiaocun, Nanmazhen, CN-322121 Dongyang, Zhejiang, Ĉinio.

* Sergĝo Nosov, 36-j., dez. kor. pri lingvoj, komputiloj, scienca fikcio, luktarto kaj lia filino 12-jara, interesiĝas pri muziko (moderna kaj

klasika), danco kaj komputila ludo. Adr.: Ivanov street 5-702, Olenegarsk town, Murmansk region, RU-184284, Rusio. Retpoŝto: tiger@olkon.murmansk.su.

* Petrenko Tanjo serĉas korespondamikojn por interŝanĝi b.k. kaj interesiĝas ankaŭ pri papertondaĵoj. Adr.: pr. ŝmidta, 36-21, Mogiljovo 212027, Belorusio.

* Membroj de Esperanto-klubo dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, aparte pri lernado en mezlernejo. Respondo estas garantiata. Adr.: Esperanto-Klubo, u. Nignevartovsk-6, 626440, Rusio.

* S-ro Kjell Peder Hoff Bjorkenes dez. kor. kaj interesiĝas pri adventismo. Adr.: 1970 Hemnes, Lillestrom, Akershua, Norvegio.

VIRINA ORKESTRO DE NACIAJ MUZIKILOJ

Kvar fraŭlinoj konsistigis malgrandan orkestron de naciaj muzikiloj de Ĉinio: Fraŭlino Fan ludas *geng-on* (21- aŭ 25-korda pluka instrumento), Yu — *erhu-on* (ĉina dukorda instrumento), Yang — biron kaj Liu — zimbalonon. La komuna amo al la nacia muziko grupigis ilin, kiuj do fondis malgrandan ĉambran orkestron de naciaj muzikiloj.

Tiuj ĉi kvar fraŭlinoj ek-lernis nacian muzikon en infaneco kaj poste studis en konservatorio. Somere de 1996 invitive ili partoprenis la Internacian Komputeran Muzikan Festivalon okazintan en Hongkong kaj tie ili kune okazigis koncerton kaj ludis modernan muzikon kaj

tradician ĉinan muzikon. Ili estis alte taksataj de la aŭskultantoj kaj muzikista rondo. Inspirite de tio, ili komencis sin prepari por fondi orkestron de naciaj muzikiloj.

Ĝenerale la tradiciaj naciaj muzikiloj de Ĉinio estas ludataj plejparte sole aŭ de granda orkestro, dum ilia kvaropa ludado estas farata en ĉambro. La de ili ludataj kvar specoj de muzikiloj estas reprezentantoj de la naciaj muzikiloj de Ĉinio kaj havas difinitan regulon en ludado, tial oni devas fari modifon al muzikaĵoj por adapti ilin al ĉambra ludado. Dank' al sia fervoro al muziko kaj senlaca penado, ili sukcesis en adaptado de antikvaj muzikaĵoj. Nun ilia prezentado elspiras ne nur la ĉinan nacian etoson, sed an-

kaŭ internacian popularecon.

MIRINFANOJ DE ĈINIO

Shi Zhan eniris en la Ĉinan Scienc-teknikan Universitaton, kiam li estis 13-jara, kaj fariĝis unu el la plej junaj studentoj en Ĉinio. Poste li studis eksterlande por doktoriĝo, solvis la malfacilan problemon "Matematika Modelo de Brown-movado", kaj en sia 30-a jaro li fariĝis instruisto de doktoriĝaj studentoj en Kuri-Universitato de Francio.

La Ĉina Scienc-teknika Universitato havas geknaban kurson, kiu en la lastaj 20 jaroj akceptis 710 malpli-ol-15-jarajn geknabojn, kia Shi Zhan. El ili 550 jam diplomiĝis el la universitato kaj ĉ. 400 el la 550 daŭrigis studon por magistriĝo en Ĉinio kaj aliaj landoj kaj pli ol 100 el ili jam akiris doktorecon. La procentaĵo de doktoriĝo estas multe pli alta ol tiu de diplomitoj el ordinaj universitatoj. Nun tiuj iamaj geknaboj jam montris siajn kapablojn en famaj universitatoj, institutoj kaj ekonomiaj establoj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

Chen Yongcong, studento de la 2-a geknaba kurso, kiel la dua eminenta sukcesinto en la landskala ekzameno siatempe, fariĝis fizika magistriĝa studento akceptita de Ĉinio kaj Usono kune. En 1989 li revenis Ĉinion kaj ekokupis sin pri alttemperatura superkonduktiva mikroskopa mekanismo. Kaj en sia 30-a jaro li fariĝis la plej juna profesoro en la nomita universitato.

La membroj de la Virina Orkestro de Naciaj Muzikiloj



La geknaba kurso de la universitato sin liberigis el rutino de instrua administrado kaj permesas al siaj studentoj rekte studi en pli alta klaso de ajna lernobjekto post ekzameno, elekti la de ili preferatan lernobjekton, anticipe partopreni scienc-esploran laboron, antaŭtempe diplomitiĝi kaj sin anonci pri ekzameno por fariĝi magistriĝa studento. La kurso alte taksas instruadon laŭ kapabloj de la studentoj kaj disvolviĝon de iliaj ĉiuflankaj kapabloj.

S-ro Zhu Yuan, ĝenerala sekretario de la Asocio de Eksterordinara Edukado de Ĉinio, opinias, ke tiu eksterordinara eduko estas iniciativo en la eduka historio de Ĉinio, tamen oni ankoraŭ ne tute konas la misteron de la intelekta kresko, kaj krome, tiu edukado estis komencita antaŭ nelonge kaj ĝi estas ankoraŭ en provado.

PENTRAĴOJ SEKRETE KONSERVITAJ 40 JAROJN

Aprile de 1998 la Pekina Galerio de Pentraĵoj unuafoje publikigis pli ol 1 000 pentraĵojn de majstro Qi Baishi (1863-1957) konservitajn 40 jarojn kaj eldonos "Kolekto de Pentraĵoj de Qi Baishi Sekrete Konservitaj en la Pekina Galerio de Pentraĵoj" (en 4 volumoj). La publikigitajn verkojn de Qi Baishi konsistigas liaj pentraĵoj pri floroj, bambuoj, pinoj, legomoj, fruktoj, herboj, insektoj, birdoj, homfiguroj kaj pejzaĝo kaj liaj kaligrafiaĵoj.

Kiel fama pentristo en la 20-a jc., Qi Baishi estas konata de la tuta lando. Liaj pentraĵoj videblas sur termosoj, mantuko kaj lavpelvo kaj en kajero aŭ lernolibro.

Qi Baishi naskiĝis en kam-

parana familio en Hunan-provinco. Li eniris en lernejon, kiam li estis 8-jara. Sed post nur unu jaro li ĉesis lerni pro malriĉeco. Li fariĝis metilernanto de lignaĵisto en la 15-jara aĝo kaj eklernis pentradon, kiam li estis 27-jara. 41-jara, li veturis en Pekinon kaj fiksloĝis tie en la aĝo de 57 jaroj. Komence li vivtenis sin per vendo de pentraĵoj kaj iom post iom fariĝis landfama pentristo. En 1953 la Kultura Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko premiis lin per honora atesto pro liaj elstaraj kontribuoj al la belarta afero de Ĉinio. En

la sama jaro li ricevis la Premion de Internacia Paco donitan de la Monda Paca Federacio kaj poste li funkciis kiel honora direktoro de la Ĉina Galerio de Pentraĵoj.

La malkaŝiĝo de la verkoj de majstro Qi Baishi donis ne nur ekzemplojn por distingi liajn verkojn disde la falsaĵoj, sed ankaŭ specifan referencon por studi liajn artaĵojn kaj belartan idealon.

MALGRANDA PANDO

En la homa imago la granda pando, nacia trezoro de Ĉinio, ĉiam asocias sin kun nobela pigreco. La malgrandaj pandoj (*Ailurus fulgens*), parencaj al la grandaj, estas same raraj kaj amindaj. Ili vivas ĉefe en Sichuan kaj Tibeto de Ĉinio.

La novnaskitaj malgrandaj pandoj estas preskaŭ same grandaj



Malgranda pando

kiel hamstro, tamen ili kreskas rapide. Post 3 tagoj ili pezas ĉ.180 g. Ĉe la monatiĝo ilia korpopezo superas 400 g. Post unu monato kaj duono ili malfermas okulojn kaj komencas petoli. Tiam la haroj sur iliaj ventroj kaj gamboj fariĝas malhelkoloraj, aperas ruĝaj kaj palruĝaj strioj sur la vosto. La haroj inter la grandaj oreloj kaj malgranda blanka buŝo fariĝas skarlataj kaj similas al tiuj de prociono. Plenkreskinte, ili estas preskaŭ same grandaj kiel kato.

Plenkreskintaj malgrandaj pandoj estas ne plu viglaj, sed moderaj en agado. Ili iras malrapide kaj ofte maĉas bambuajn foliojn, kuŝante sur branĉoj. Nun oni ankoraŭ ne scias, kiom da malgrandaj pandoj estas en la naturo, tamen oni scias, ke en la zooj de ĉiuj landoj estas entute ĉ. 600 malgrandaj pandoj.

Tradiciaj ludoj kaj ludiloj

de PANG NAIYING

Mi volas scii pri diversaj infanaj ludoj kaj ludiloj.

KIMMO HAKALA (Finnlando)

LA vortoj de nia leganto Kimmo Hakala vekis ĉe mi rememoron pri mia infana ĝojo, alportita de diversaj interesaj ludoj kaj ludiloj. Kvankam la ludoj kaj ludiloj de la 50-60-aj jaroj estas tre simplaj, malpli modaj ol tiuj de la 90-aj jaroj, tamen ili odoras pli da niaj naciaj trajtoj.

DONACOJ DE LA NATURO

La infanoj estas favorataj de la naturo. La floroj, birdoj, herboj kaj insektoj ĉiuj estas donacoj de la naturo por la infanoj. En la jaroj, kiam la vivo de ĉinoj ne estis riĉa, la ludoj kaj ludiloj de la infanoj dependis ĉefe de la naturo.

*Verdas la salikoj,
Kurbas longaj vergoj.
Pendas ili super akvo,
Flutas mi per salik-ŝalmo
kaj prikantas primaveron.*

Tiel kantas infanoj. Kiam ili blovas per salika ŝalmo kaj kuras sur kampo, banate de sunbriloj kaj grundodoro, ili kunfandiĝas kun la naturo.


Kompreneble, por infanoj la plej allogaj estas insektoj, inter kiuj agrioto (*Agriotes fuscicollis*) estas ilia bona amiko. Tiuj insektoj ofte gastas en la korto de infanoj. La infanoj metas agrioton sur tabulon, premetas ĝian ventron kaj demandas: "Ĉu pluvos hodiaŭ?" La insekto do kapjesas. Aŭdinte tion, la infanoj eksplodas de ridego. Kaj kiam la infanoj metas ĝin surdorse sur tabulon kaj demandas: "Kiom alta estos nia tritiko?" La insekto do saltas supren. Kaj la infanoj klakigas la manojn, kriante: "Aha, tiel alten kreskos la tritiko!"

Ĉe alterno de somero kaj aŭtuno la knaboj ŝatas ludi per griloj, kaptitaj en herbaro aŭ fendo de rokoj ĉe urbomuroj. Knaboj metas du bravajn virgrilojn kun longaj kruroj kaj larĝa dorso en argilan vazon kaj incitas ilin per maldika herbotigo, la du griloj do ĉirpas kaj luktas. Post lukto la venkinto ricevas laŭdon. Tiam, eĉ se ĝia juna mastro malsukcesas en lerneja ekzameno, li ne ĉagreniĝas kaj nomas la venkintan grilon ĉiamvenka generalo.

DIVERSAJ INFANAJ AMUZOJ

En Ĉinio multaj popolaj ludiloj havas ian rilaton kun festoj. Ili estas transformitaj el bonaŭspiciaj objektoj kun la signifo de benado al la posteuloj.

En vilaĝoj infanoj ŝatas tolan kaj argilan tigrojn, ĉar oni opinias, ke tigro estas reĝo de la bestoj, ŝatas manĝi diablojn kaj kapablas forpeli perversajn feojn, tial la tieaj infanoj portas tigrajn ŝuojn kaj ĉapon kaj dormas kun kapo sur tigra kuseno. En festoj oni donacas tigrajn ludilojn



al infanoj, por ke la tigro garantiu la sanan kreskon de la infanoj.

La sepa de la sepa monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas tago de kampara festo por peti spritecon de virinoj. Tagmeze knabinoj metas vazon kun akvo en sunlumo kaj po unu kudrilon en la akvon. Oni do aŭguras spritecon de la metinto laŭ ombro de la kudrilo. La mallarĝa ombro simbolas spritecon de la metinto kaj la dika — stultecon... Tiam en kuirejo iliaj patrino kaj avino sin okupas je preparo de modlitaj farunaĵoj, kiaj 12 bestoj kun simbolo de naskiĝjaro, krevinta granato kun simbolo de multe da posteuloj kaj peonio kun simbolo de riĉeco kaj nobleco. Fininte la preparon, ili proponas al la knabinoj kunligi la farunaĵojn per fadenoj. La knabinoj manĝante faras tion.

Antaŭvespere de la Printempa Festo en Ĉinio ĉie lumas lanternoj. Tiam la knabinoj bruligas fajraĵojn kaj knaboj krakigas petardojn. La fajraĵoj tre brilaj kaj buntaj lumigas la ĉielon kaj teron, dum la petardoj tondras. En la bruego la maljuna avo brakumas la timeman infanon konsolante: “Ne timu! La petarda bruego fortimigas la diablon kaj tiam ni ne suferos de malsano.”

En la komenco de aprilo estas tagoj por flugigi kajton. La ludo estas ŝatata de infanoj kaj ankaŭ de plenkreskuloj. Estas diversformaj kajtoj: birdaj, fiŝaj, bestaj kaj homfiguraj. La kajtoj naskiĝis antaŭ 2 400 jaroj. Origine ili estis ligna milvo. Historia libro notas, ke siatempe oni faris lignan pigon kaj flugigis ĝin, kiu povis ŝvebi plurajn tagojn sur la ĉielo. Poste naskiĝis milvo el papero, uzata kiel amuzilo kaj komunikilo en la milita afero. La kajtoj estas malsamgrandaj. La gigantaj kajtoj estas tre potencaj. En la 50-aj jaroj estis junulo, kiu flugigis kajton altan je 4.7 m. Pro forta vento la flugiganto ligis la ŝnuron al sia talio kaj faris nodon ĉe aŭto. Estis ekster la atendo, ke la leviĝinta kajto, blovate de forta vento, abrupte streĉis la ŝnuron, levis supren la junulon kaj du radojn de la aŭto. Ho, terure! Apudstarantoj kuris helpi kaj la junulo estis savita. Tial la infanoj devas flugigi kajton en konvena grandeco. Tiaokaze iliaj gepatroj ne malhelpas ilin kaj lasas ilin ludi laŭvole. Iam pro forta vento oni proponas rompi la ŝnuron kaj diras: “La kajto forportas la malferliĉon.”

La ĉinaj infanoj ja estas klerigataj de la antikva kulturo, amuzante sin per popola ludo.

ĜOJO EN LUDO

La infanoj estas denaske viglaj. Ĉiutage ili pasigas plurajn horojn en lernejo. Ĉiufoje, kiam aŭdiĝas sonorilo, ili pafiĝas al placo por diversaj ludoj. La ludiloj estas simplaj kaj interesaj. Ili

kuras, saltas...

Knaboj ŝatas ludi feran ringon. La ringo kun diametro de 40 cm estas ligita kun kelke da malgrandaj feraj ringoj. Oni rulas ĝin antaŭen per hoka stango, kio faras bruegon. Knabinoj bone ludas piedvolanon el kupra monero kaj plumoj, kiu similas al floro. Iuj lertaj knabinoj povas supren frapi piedvolanon 200-foje unuspire.

Salti super kaŭĉuka ŝnuro estas ludo de knabinoj. Ili faras la ŝnuron el malnova bicikla aertubo. Du knabinoj tenas la ŝnuron en la mano, dum aliaj saltas super ĝi kantante. Kun finiĝo de ĉiu kanto la kaŭĉuka ŝnuro leviĝas foje refoje, de kruro al talio, akselo, ŝultro, orelo, eĉ ĝis la kapo. La malaltstaturaj knabinoj devas unue tiri la ŝnuron malsupren kaj poste salti, dum la superemaj knabinoj saltas kun etenditaj kruroj kaj piedpintoj. Tiu ludo estas kombino de gimnastiko, danco kaj kanto. Lertaj knabinoj saltas gracie kiel hirundo.

Ĵeti sakon estas ŝatata ludo de geknaboj. Du infanoj en la distanco de dekelkaj metroj ĵetas unu al la alia sakon plenan de maizgrajnoj aŭ sablo por trafi la ceterajn infanojn, kiuj kuras inter ili por eviti la ĵetadon. La bravaj ĉiamaniere kuras renkonte al la ĵetanto por kapti la sakon, ĉar tiamaniere ili povas savi tiun, kiu estis trafita kaj punita je apudstarado. Tiu ludo instruas la infanojn, ke harmonia kunlaboro kondukas al venko.

La infanoj ĝoje ludas ĉiam kaj ĉie. Ĉiu objekto povas fariĝi ilia ludilo. El papero ili povas fari ĉapon, boaton aŭ balonon. El fadeno ili povas formi diversajn geometriajn figurojn. El simplaj ŝtonetoj ili povas fari ŝakpecojn.

Vespere, ili bruligas kandelon kaj per siaj manoj faras diversajn ombrajn figurojn, tiel ke sur la muro aperas leporo kun longaj oreloj, vulpo kun elstaranta buŝo kaj aglo kun etenditaj flugiloj... ■

Paco-kompanio servas al vi

La Paco-kompanio (Ĉinio) por konsultiĝo pri internacia afero

Servas al investantoj, turistoj kaj fakuloj: Importo kaj eksporto de komercaĵoj; Laboro en Ĉinio; internacia geedziĝo.

Adr.: Direktoro Ling Bo, P.O. Box 2, CN-230001, Hefei, Ĉinio.

Tel/Fax: +86-551-2632545; -4484606

Hejmpaĝo: <http://www.online.ah.cn/pac/>
Ret-poŝto: cnhflib@public.hf.ah.cn

Infanoj en familio sen patro aŭ patrino

*Patro havas sian propran familion,
patrin' havas sian propran familion,
forlasinte min solan
ne konantan kialon...*

La malĝojiga kanto ĉiam plorigis la 15-jaran Ye Ming, kies larmoj foje-refoje malsekigis la kapkusenon. Du jarojn antaŭe liaj gepatroj divorcis, la patrino iris eksterlanden por reedziniĝi, la amatino de la patro ne volis, ke Ye Ming loĝu ĉe ili. Post longa hezitado la patro decidis konfidi lin al siaj parencoj en kamparo. Por ne fariĝi ŝarĝo de la patro kaj povi sin vivteni en la sama urbo, kie la patro loĝis, Ye Ming sin ekokupis pri legomovendado. Tiel li ĉesigis la lernejan vivon.

En la pasintaj jaroj la divorca procento en Ĉinio leviĝis, sekve plimultiĝis senpatr(in)aj familioj. Kvankam la konceptoj de ĉinoj pri edzeco kaj familio jam multe ŝanĝiĝis, — ĝenerale oni ne kiel antaŭe alimaniere traktas la infanojn, kies gepatroj divorcis, kaj la divorcintaj gepatroj daŭrigas sian devon vivteni la infanojn, — tamen la neatendita rompiĝo de la familio kaj manko de familia intimeco pli-malpli vundis la sentojn de la infanoj.

De la infaneco Xiao Jie estas simpatia. Post kiam la patro forlasis la patrinojn kaj ŝin, ŝi donis pli multe da zorgoj al la patrino. En la lernejo per sia bona konduto ŝi akiris laŭdon de la instruistoj kaj kunlernantoj. Foje ŝiaj kamaradinoj vizitis ŝin. Ili parolis pri sia propra patro. Iu diris, ke ŝia patro antaŭ nelonge aĉetis novan librosakon por ŝi; alia diris, ke ŝia patro ofte akompanis ŝin al amuzejo... Tio kaŭzis al la ĉiam kvietaj Xiao Jie eksplodon de kolero. Ŝi kriegis: "For, vi ĉiuj for!" Kaj la renkontiĝo finiĝis per malĝojo. Pro tio la patrino riproĉis ŝin, kiu kun larmoj elverŝis sian koron: "Ili paradis per sia patro, tio dolorigis min."

La infanoj ne komprenis, kial la gepatroj disĝis, kial ili forlasis ilin. Vizaĝe al la abrupta okazaĵo,



Restas al li nur amo de la patro.

ili iam penadis persvadi la gepatrojn repaciĝi, tamen pli ofte ili pro sia nemaleco ne sciis kion fari. La 16-jara Zhao Bin ofte alfrontis tian malfacilon: "Kiam la patrino riproĉis la patron, mi montris malkontenton kontraŭ ŝi; kaj ĉe la patro mi defendis la patrinojn, tiel nek li nek ŝi trovis min komprenema." Parolante li, aspektanta kiel plenkreskulo, iom konfuziĝis.

Inter la divorcintoj multaj estas erudiciuloj kaj mezaĝuloj, kies infanoj plejparte vizitas mezlernejon. Pro bona edukado kaj prudento la infanoj finfine komprenis kaj pardonis la gepatrojn sciante, ke la lastaj efektive amas kaj amos ilin. En la okuloj de Xiao Hua, la gepatroj estas la plej bonaj en la mondo. Dum 3 jaroj post sia divorco la patro ne sciis, kiel klarigi la okazintaĵon al la filino. Foje li ricevis leteron de la filino, kiu konigis al li sian lernadon, promesis bone prizorgi la patrinojn kaj deziris al li bonfarton. La vortoj korus lin kaj forpelis lian konscienciproĉon.


Tamen nemalmultaj infanoj falis en la embarason similan al tiu de Ye Ming, suferante kaj en vivo kaj en sento. Tion kaŭzis ĉefe iliaj gepatroj: iuj el ili zorgis pli multe pri si mem rigardante la infanon ŝarĝo, sekve sentigis al la lasta humilecon kaj eĉ splenon; aliaj pli serioze vundis la sentojn de la infano pro sia malkontento pri la geedzeco; triaj psikologie ŝarĝis la infanon per la vortoj “ĉe mi estas nur vi ununura intimulo, mi dependos de vi”.

Koncerna departemento faris enketon al 50 elementlernejoj, kies gepatroj divorcis. Oni trovis, ke 34 el ili fariĝis malkuraĝaj kaj nememfidaj, 7 — egoismaj kaj flamiĝemaj. Iu enketita knabo diris: “Panjo, ne malĝojigu! Mi vivtenos vin post mia plenkreskiĝo. La patro estas malbonulo, ĉar li

forlasis nin.” Iu knabino diris: “Antaŭe la patro tiel intime traktis la patrinojn, tamen nun ĉio ŝanĝiĝis. Plenkreskinte, mi ne edziniĝos.” Evidente la animo de la infanoj pli-malpli malnormaliĝis.

Iuj homoj, kiuj eliris el malsukcesa geedzeco, faras klopodon por harmoniigi la rilatojn inter la anoj en la nova familio. La patro de Shasha estas taksiisto. Li tuttage laboregis intencante havigi al si pli multe da mono por lernigi la filinojn en la plej bona lernejo. Tamen la filino ne kontentis: “La patro estas tiel okupita, ke li ne havas tempon akompani min. Inter li kaj mi ŝajne nur ekzistas tiaj aferoj, kiaj manĝado, vestado kaj pago por lernado. Fakte mi deziras amikiĝi kun li, ĉar por mi nur li estas la plej intima en la mondo.” Informiĝinte pri tio, la patro multe ŝanĝiĝis. Li ne plu drinkadis nek ebriiĝinte krude traktis la filinojn, krome li pli frue ol antaŭe revenis hejmen por prepari manĝon kaj amuzis la filinojn per interesaj paroltemoj.

Por helpi la infanojn en senpatr(in)a familio kaj havigi al ili ŝancon pli multe kontakti la socion kaj komuniki sentojn, en iuj urboj oni starigis koncernajn lernejojn kaj konsultejojn. Ĝuste en aktivado okazigita de la konsultejo la patro de Shasha konis ŝian deziron. Ankaŭ studento-volontuloj prizorgis la senpatr(in)ajn familiojn. Helpi la senpatr(in)ajn infanojn estas devo de la tuta socio. ■



Kaj por tio kaj por alio (Karikaturo)



Nanjiao-a Lakto-Kompanio de Pekino

de HONG TU

Kun moderniĝo de la socia vivo kaj ŝanĝiĝo de la ĉinaj tradiciaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, loĝantoj en Pekino bezonas pli kaj pli multe da lakto. Tio multe akcelis la produktadon de laktaĵoj. La Nanjiao-a Lakto-Kompanio de Pekino multe progresas en tia situacio.

Ĝi estas granda kombinato de brutobredado, terkulturado kaj fabrikado. La kombinato konsistas el 43 entreprenoj de tri specoj: bredado, plantado kaj laktoproduktado, inter ili estas 9 bovobredejoj, kie estas 10 200 laktobovoj, kiuj ĉiujare produktas 28 milionojn da kg da lakto, t.e. 1/5 de la totala produktokvanto de freŝa lakto de Pekino.

En la konkurenco de merkata ekonomio, la Nanjiao-a Lakto-Kompanio faras ĉion eblan por altnivela administrado, granda profito kaj havigio de pli bonaj vivkondiĉoj al siaj laborantoj. Pro reformado de sia ekonomia kaj organiza strukturoj, la kompanio atingis bonan efikon. En 1998, ĝiaj produktovaloro atingis 65.76 milionojn da juanoj kaj profito — 11.51 milionojn da juanoj (1 usona dolaro = 8.3 juanoj).

Kial la Nanjiao-a Lakto-Kompanio atingis tiel grandan sukceson en la merkata konkurenco? Ĝia ĝenerala direktoro, s-ro Zhu Hongxing, diris:



“Ni ne havas sekretan rimedon. En la merkata konkurenco, ni kaptas la ŝancon, havas klaran celon, kaj ĉiuj membroj de nia kompanio unuanime laboras.”

Pri la detalo li diris: “Unue ni ellaboris taŭgan planon cele altiĝi la enspezon de la laborantoj. La unua paŝo estas utiligi la neuzitan kapitalon, kaj poste malpliigi la laborantaron kaj pliigi la profiton, fari ĉion eblan por pliigi la lakto-produktadon, plibonigi la prilaboradon de manĝaĵoj, disvolvi servojn kun la ĉefa atento pri ekspluatado de bieno. Nia estraro faris novan ekonomian kontrakton kun la subaj entreprenoj. Faktoj pruvis, ke ni iras la ĝustan vojon.”

Ili reordigis strukturon de kapitalo kaj investoj. La kompanio unuigis plurajn avantaĝajn entreprenojn, por ke la lakto-produktado fariĝu pli ampleksa.

Por antaŭenpuŝi la reformadon, estis multe malpliigitaj la laborantoj. Ĝis la fino de 1998, elposteniĝis ĉ. mil laborantoj. Nun la bazaj oficistoj kaj ordinaj laborantoj pli diligente laboras.

Pri la estonteco de la kompanio s-ro Zhu diris: “Nia kompanio estas esperplena pro ĝia bona servo al la tuta socio. Ni sukcesos en la merkata konkurenco. Tion mi kredas.”



Adr: Zhu Hongxing, Nanjiao Niunai Gongsi, Nanjiao
Demaozhuang, Fengtai Qu, CN-100076 Beijing, Ĉinio
Tel: +86-10-67993138



Mia najbaro en Alaska
de **RUBEN FELDMAN
GONZALEZ** (Usono)



Montara izolejo
de **UGO PENSABENE**
(Italio)

ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》一九九八年第十二期

(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11-1339/G2